FERNANDO DE DIEGO

◈

PRI ESPERANTA TRADUKARTO

◈

5767

Artur E. Iltis

16 x 2007 lot 00596.4 ea

FERNANDO DE DIEGO

PRI ESPERANTA TRADUKARTO

Enkonduka eseo, bibliografio kaj indeksoj
de
Reinhard Haupenthal

Artur E. Iltis
Saarbrücken 1979

5964

© Copyright by the author

FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTISTAS

Kompostita de
INTELESKO
Internacia Elektronika Esperanto-Kompostado

Al amiko Antonio Alonso
kaj lia edzino, danke por
agrablaj tagoj pasigitaj
en Santiago de Compostela.

F. Arjeqp

Zaragoza 16-6-81

TABELO DE ENHAVO

Triŝtupa klerigado de la esperantistoj 5

PRI LA ESPERANTA TRADUKARTO

1. Antaŭrimarko 11
2. Esperanto en rilato al la naciaj lingvoj 12
3. La prozaj verkoj tradukitaj en Esperanton 23
4. La poeziaj verkoj tradukitaj en Esperanton 33
5. Arkaismoj kaj neologismoj kiel helpiloj de tradukado 43
6. Praktikaj konsiloj kaj futuro 54

Notoj 63
Indeksoj 67

Reinhard HAUPENTHAL

TRIŜTUPA KLERIGADO DE LA ESPERANTISTOJ

Moto

"Lingvo internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiu akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, *heredan*. Cento da *tiaj* homoj estas por la ideo de lingvo neŭtrala multege pli grava ol milionoj da aliaj homoj. Hereda lingvo de la plej malgranda kaj sensignifa popoleto havas vivon multege pli garantiitan kaj neestingeblan, ol senpopola lingvo, kiun uzus eĉ milionoj da homoj." (Zamenhof, *Originala Verkaro*, p. 323; letero de 1901-05-28 al Kofman.)

El tiu malmulte konata konvinko de Zamenhof ni deduktas, ke la aŭtonomio de la Esperanto-movado devus esti ĝia primara celo. Ne la ekspansio (ekz. la deviga enkonduko de la lingvo en la lernejojn kun ĉiuj frustracioj rezultontaj el tio), sed la memstareco garantios la futuron de nia movado. Tio samtempe signifas, ke pli gravas kvalito ol kvanto. Tion konsciigi al la esperantistaro (precipe al personoj kun defetisma tendenco) estas same elstara kultura tasko kiel la sciencigo de nia argumentado. La argumento de la forto troviĝas ankaŭ en tio, ke ni disponu pri kultura kolektivo konscia kaj fiera pri sia lingvo kaj tial povanta impresi per la forto de sia argumento venanta ne el teoria rezonado sed el spertoj kaj konvinkoj science analizitaj. Dum la ekspansiajn esperojn de nia movado povas plenumi nur eksteraj eventoj (ekz. politikaj decidoj, perforta enkonduko de la lingvo en la lernejojn aŭ simplaj hazardoj), la internan fortikiĝon povas plenumi nur ni mem.

La sekvantaj konsideroj provas liveri aspektojn sub kiuj estas realigebla tiu fortikiĝo kaj solidiĝo.

Tezo-katalogo

Ni eliros de la jenaj tezoj:

1) Kiel planlingvo Esperanto ne estas ies proprâjo.
2) Malantaŭ Esperanto ne staras precize difinebla socia portanto. Tio kondukis al la formulo "ĉies lingvo".
3) La socia portanto de Esperanto estas internacia kolektivo kiu sola povas krei kaj pludoni la kulturajn valorojn de tiu lingvo.
4) La klopodoj de tiu kolektivo ĝeneraligi Esperanton plej forte esprimiĝas en la strebado enkonduki la lingvon en la lernejojn.
5) Ĉiuj ĝisnunaj klopodoj en tiu direkto fiaskis, kaj nenio nuntempe signalas sanĝon en tio.
6) La enkonduko de Esperanto en la lernejojn ne garantios kreadon kaj pludonadon de la kulturaj valoroj de Esperanto.
7) Zorgi pri tio povas, fine, nur la esperantistoj mem, t.e. la organizita Esperanto-movado akirinte klarecon pri la rolo kaj la situacio de Esperanto mem.
8) Tio signifas, ke la celado de la organizita Esperanto-movado rajtas kaj devas esti duobla:
   a) unuflanke plu demonstri, ke Esperanto estas la sola taŭga solvo de la lingvo-problemo;
   b) zorgi mem kaj ne fidi aliajn, ke Esperanto fariĝu kultura posedaĵo de ĝiaj parolantoj.
   El tio rezultas, ke a) estas farebla ĉiam nur post b).
9) La Esperanto-movado devas krei ekvivalentojn por la instruaj instancoj ekzistantaj por la etnaj lingvoj kaj havi kiel idealan celon la kulturan dulingvecon.
10) La instruado kaj klerigado de la esperantistoj kaj personoj lernontaj la lingvon devas sekvi metodikajn kaj didaktikajn kriteriojn.

Ni detaliĝu

La Esperanto-movado estas aŭtonoma kultura movado. Ĉar ĝi ne fiksiĝis nek, pro sia aparta karaktero de tutmondeco, povas fiksiĝi teritorie, ĝi ne povas formi fermitan socian unuon kun tipaj soci-ekonomiaj organiz-formoj. Pro tio ĝi ne disponas klerigajn institucioj n (ekz. lernejojn) establiĝintajn en ĉiuj kulturaj ŝtatoj. Ĝi do devas mem zorgi pri konvenaj ekvivalentoj, se la kultura pretendo ne malpraviĝu kaj absurdiĝu. Kleriga laboro en la Esperanto-movado povas kaj devas okazi (kaj dekomence ja okazis kaj helpis pluekzistigi la lingvon) sur tri (geografiaj) niveloj: loka aŭ regiona, landa kaj internacia. La niveloj estas ankaŭ intelektaj. En plej simplaj formuloj tio signifas, ke la adresatoj de niaj klerigaj aranĝoj estas tri person-grupoj (kies limoj estas ne precize fikseblaj): komencantoj, progresintoj kaj parolantoj de la lingvo. Ĉar la "natura" vojo de lingvakiro, la lingvo-heredo, estas ankoraŭ fenomeno malofta en la Esperanto-movado (la nuna nombro de denaskaj esperantistoj certe ne sufiĉas por garantii la futuron de la lingvo), ĝi sekve devas zorgi ankaŭ pri la ensociigo de novaj parolantoj. Ofte la esperantistaro limigis sian laboron al tio kun la naiva kredo, ke tio sufiĉus por prigrandigi la movadon. Ĉe tio oni forgesis, ke necesas ankaŭ emocia katenado al la lingvo, kiu povas realiĝi nur en konkreta lingva medio kaj neniam en klasĉambro. La intelekta ekkono pri ekz. la morfologia strukturo de Esperanto ne sufiĉas por elteni, se tia ekkono ne transformiĝas en la firman volon aparteni al la lingva kolektivo, eĉ kun ties strangaĵoj kaj miskreskoj.

Niajn sekvajn konsiderojn ni limigas al kelkaj esencaj aspektoj de nia problemo.

La sperto de SEL

La sekvaj ekzemploj rezultas nek el ia parolado *pro domo* nek el ia vanta sinlaŭdo, sed el provo transformiĝinta en pozitivan sperton

indan esti reprovata aliloke. Ĝi eliras de du premisoj: a) la Esperanto-movado bezonas altirajn kunvenojn en kiuj plenumiĝas la socia realiĝado de nia lingvo; b) ĝi devas mem krei ilin. – Kun tia konsidero Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL) aranĝas regule, de 1973, dufoje jare kulturajn semajnfinojn. Kion ili celas?

A. – La sola ebleco por plenkreskuloj (ni ne parolos ĉiloke pri lernejaj kursoj ŝuldataj nur al idealisma sindediĉo de instruistoj) lerni la lingvon estas la aŭtodidakta metodo (taŭga nur por obstinuloj) aŭ la vesperaj kursoj (ofte fiaskantaj pro neatingebla minimumo de kursanoj). Por ne definitive defaligi tiun grupon de personoj SEL enprogramigis intensajn kursojn ankaŭ por komencantoj. La grupa lernado kaj la evidento, ke ekzistas aliuloj pluklopodantaj kaj praktikantaj la lingvon ne povas ne efiki instige. Tiel la kursanoj tuj spertas, ke ekzistas Esperanta medio praktikanta tiun lingvon kaj ke la idealo de la Esperanto-movado estas la kultura dulingveco. Kredeble tiu "socia" metodo helpas malpliigi la kvoton de la apostatoj.

B. – La ekstermovadaj eblecoj daŭrigi la lernadon, profundigi la lingvoscion kaj konatiĝi kun la kulturo de la lingvo estas praktike nulaj. Cefe tiu meza person-grupo suferas pro la manko de lernejaj ekvivalentoj kaj de la neglektemo de la movado. Tiu transira fazo ĉesigas la apartenon al la puraj kaj nuraj komencantoj, sed ankoraŭ ne ebligas firman partoprenon en la Esperanta vivo. Ju pli da zorgo estas dediĉata al tiu grupo de estontaj esperantistoj, des pli kreskos la ŝanco kateni al nia lingvo kaj al nia idealo ĉiam novajn adeptojn.

Tiaj mezgradaj kursoj peru trioblan kapablon:

– legadon
– tradukadon
– paroladon.

Lingvolerne profiti de la legado (kio, kompreneble, ne direktu sin kontraŭ la lega ĝuo kaj plezuro, cetere apenaŭ instrueblaj) estas unu el la celoj de tia kurso. Ĉe tio gravas ne nur la fakto, *ke* oni legas, sed ankaŭ *kion* oni legas. Oni ne foroferu al la facilo la enhavon. Lingv-

aĵo kompakta (demonstranta la esprim-eblojn de Esperanto) kaj enhavo altira faras multon por frue impresi pozitive pri nia literaturo. (Oni memoru la belegan ekzemplon de *Vagado sub Palmoj* de Ribillard, kiun reeldonis Artur E. Iltis.)

Tradukado (nacilingven kaj Esperanten) helpas duoble: ĝi kreskigas la aktivan vort-trezoron kaj ĝi poluras la stilon, tiom pli, se temas pri ankaŭ beletraj tekstoj. Instrua sperto estas traduki tekston jam tradukitan de Zamenhof (al germanoj ni rekomendas *La Rabeno de Bañarañ* de Heine) kaj kompari ambaŭ versiojn. Mi ne konas rimedon pli adekvatan por ekkoni kaj akiri tion kion oni nomis "la spirito de la lingvo".

Parol-ekzercoj helpas transformi lingvon en parolon. Ili povas esti tekst-rilataj aŭ rilataj al libera temo. Oni klopodu praktiki establitajn parol-formojn: dialogoj, diskutoj, podiaj diskutoj, debatoj, paroladoj, prelegetoj, pledoj ktp.

Cetere, ankaŭ por skribaj laboroj tio validas: formoj konataj al junaj lernantoj ofte ne praktikeblas de longjaraj esperantistoj: raporto, priskribo, précis, traktaĵo, diskuto, enhavo-resumo, analizo de nocioj aŭ tekstoj.

C. – La konstato, ke ofte eĉ longjaraj esperantistoj estas kulture (mi parolas pri nia Esperanta kulturo) treege subevoluintaj, necesigas, ke ankaŭ por personoj praktikantaj la lingvon necesas kleriga oferto.

Enkondukante siajn Kulturajn Semajnfinojn SEL ŝanceliĝis inter la alternativo prezenti fakajn prelegojn pri neesperantaj temoj (do konsideri la lingvon en ĝia rimeda karaktero) aŭ konsideri la lingvon kiel vehiklon de kulturaj valoroj, t.e. prezenti temojn pri esperantologio. Ni decidis iri la duan vojon tial, ĉar la kleriga oferto pri ĝeneralaj temoj estas sufiĉe vasta ekster la movado, dum "nian" temaron neniu ofertos al ni, se ni mem ne faros tion.

El tia konsidero (post la forlaso de ia miksita strategio, celinta kompromisi inter ambaŭ ebloj, sed ne povinta atingi ian koheron) rezultis en 1974 preleg-serio pri Stellan Engholm (ankoraŭ kun pluraj

prelegantoj). En 1975 sekvis prelegoj de Tazio Carlevaro (Psikolingvistiko kaj interlingvistiko) kaj Eddy Borsboom (Eugène Adam (Lanti): lia vivo, lia verko kaj lia rolo en la laborista Esperanto-movado).

En 1976 prelegis: Fernando de Diego (La Esperanta tradukarto) kaj Hartmut Trunte (Enkonduko en la lingvistikon de Esperanto).

Sekvis en 1977: William Auld (Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto) kaj Uwe Joachim Moritz (Etnaj minoritatoj en Eŭropo).

Kaj en 1978 prelegis: Reto Rossetti (Enkonduko en la stilistikon de Esperanto) kaj denove Tazio Carlevaro (70 jarojn planlingvo Ido).

El tiu bunta paleto de altvaloraj prelegoj tiuj de Auld kaj de Diego nun aperas libroforme.

Eksperimentinte kaj analizinte la spertojn ni do rekomendas por tiaj C-kursoj unuecan temon kaj unusolan kompetentan prelegan-ton, kiu traktu sian temon en kvin lekcioj lasante tempon por diskuto. La partoprenantoj konu unu el la verkoj traktotaj kaj, surbaze de la aŭditaĵo, daŭrigu la legadon de aliaj pritemaj aŭ samaŭtoraj verkoj. Jen samtempe rimedo por akceli nian libro-merkaton.

Konkludo

Jen, tre resume, la kvintesenco de teoria rezono transformiĝinta en konkretan praktikon ĝuanta la estimon kaj aprobon de ĉeestintoj el kaj ekster la teritorio de SEL. Estus dezirinde se tiu ekzemplo fondus skolon helpantan al la memfido de la esperantistoj kaj al la konfido al la afero al kiu ni dediĉas nin. Tio certigos la estontecon de Esperanto multe pli ol iafojaj megalomaniaj pretendoj aŭ blufaj bruoj.

I.

ANTAŬRIMARKO

Antaŭ ol komenci, mi deziras publike esprimi mian sinceran dankon al Sarlanda Esperanto-Ligo, ĉar ĝi havis la ĝentilon inviti min partopreni al sia 7-a Kultura Semajnfino (okazinta de 7-9 Majo 1976 en la Konferencejo "Junkerwald" en Blieskastel – Niederwürzbach), ke mi parolu pri temo tre proksima al mia koro.

Mi timas, ke miaj opinioj kaj konkludoj ne plaĉos al multaj: sed, ĉar tiaj opinioj kaj konkludoj estas frukto de jarojn longa sperto kaj eksperimentado en la kampo de la tradukarto ĝenerale, kaj de la Esperanta tradukarto speciale, mi eldiros ilin kun trankvila konscienco. Mi baziĝas ne sur teoriaj premisoj, sed sur sobraj faktoj. Se mi eraras, mi eraras honeste, sed same honeste mi modifos aŭ ŝanĝos miajn ideojn, se oni pruvos ilin arbitraj aŭ senfundamentaj.

En la temo pri la tradukarto leviĝas demandoj rilataj al aliaj aspektoj kaj problemoj de nia lingvo indaj esti diskutataj en fina kolokvo, kie, espereble, fariĝos, se ne la plena lumo, almenaŭ la helo sufiĉa, ke ni povu sekvi la bonan vojon.

F. d. D.

II.

ESPERANTO EN RILATO AL LA NACIAJ LINGVOJ

Kiam mi pensas, ke nia eminenta profesoro Gaston Waringhien verkis ĉarman kaj nesupereblan eseon pri la fiziko kaj la metafiziko de la traduk-arto[1], mi sentas min tiel sensignifa, ke mi jam anticipe petas la pardonon de miaj aŭskultantoj, pro mia absoluta manko de erudicio kaj de didaktika kapablo.

Nu, iasence, ĉiuj homoj estas tradukistoj: laŭlonge de nia vivo, tagon post tago, horon por horo, eĉ minuton post minuto, ni tradukas parole aŭ skribe al ni mem, en nian propran nacian lingvon, la komplekson da sentoj kaj da intelektaj nocioj, kies esprimado necesas en nia socia medio. Kaj la fakto, ke ekzistas personoj, kies kapablo interpreti sin mem estas preciza kaj kompleta, dum aliaj povas doni per vortoj nur palan ideon de sia interna mondo, implicas, ke la arto traduki kaj interpreti pli malpli fidele, pli malpli artisme, pli malpli plastike dependas ĉefe de la pli malpli granda riĉo de ia natura, denaska kvalito en la persono mem. La bonaj tradukantoj kaj interpretantoj de si mem estas la grandaj aŭtoroj, la grandaj poetoj, la grandaj filozofoj, t.e. la grandaj majstroj de la esprim-rimedoj. Sed la tradukado estas tiel diable malfacila arto, ke multfoje, eĉ la plej geniaj artistoj de la plumo plendas pri tio, ke ili ne kapablas redoni la tutan amplekson kaj profundon de siaj intuaj aŭ intelektaj mondoj, kaj ke ekzistas en ili io, kion ili sentas kaj tamen ne povas eksterigi en komunikebla formo.

Tiel do, ni povas jam starigi du asertojn: 1) la bona tradukisto naskiĝas tia dank' al siaj denaskaj kapabloj; kaj 2) ne ekzistas redono absolute fidela al la originalaj pensoj kaj sentoj. Eĉ ne spegulo reflektas la tutan veron antaŭ ĝi: ĉar, kio estas dekstra en la subjekto fariĝas

maldekstra en la spegulo.

El kiuj elementoj konsistas la natura, denaska kvalito de la bona tradukisto? Mi dirus, ke el la samaj elementoj propraj al muzika aŭ arta temperamento: sento pri ritmo, koloro kaj melodio; estetika intuicio; kapablo analizi kaj sintezi. Kaj surbaze de ĉi tiuj, ni diru krudaj materialoj, la bona tradukisto devas submeti sin al jarojn longa periodo de specialiĝo en plej diversaj intelektaj kampoj, se li deziras inde plenumi sian oficon.

Kaj jen nia bona tradukisto antaŭ la tasko. Li devas redoni, por ekzemplo, anglan originalon en la francan. Li profunde konas la anglan, vaste kaj longe vojaĝis en Usono kaj Granda Britujo, studis dum multaj jaroj ties klasikajn kaj modernajn aŭtorojn, disponas nombron da vortaroj en ambaŭ lingvoj: vortaroj ĝeneralaj, slangaj, teknikaj, historiaj, frazeologiaj, kaj povas skribi al diversaj anglalingvaj amikoj por trakti kun ili eventualajn dubajn punktojn de la originalo.

Sed, same kiel la bona poeto aŭ la granda filozofo iam tiam konfesas sian nekapablon redukti al vortoj la lastan profundan vibron de sia sento aŭ de sia intelekto, tiel same la bona tradukisto humile konfesas anticipe, ke io nepalpebla, io nedifinebla nepre sukcesos eskapi el lia plej neriproĉebla versio.

Ĉar la netranspasebla obstaklo de la tradukado konsistas en tio, ke la naciaj lingvoj estas la plej rektaj esprimoj de la respektivaj naciaj karakteroj, la unua manifestiĝo de la homa spirito sur ties ĉirkaŭa mondo. Traduki ne limiĝas do, kiel multaj pensas, al la redono iom aŭtomata kaj mekanika de la objekto, laŭ la maniero de fotilo; la tradukisto devas samtempe klopodi reprodukti la akordojn kaj tonrilatojn de la elira lingvo, kiu havas malmulton komunan kun la toniko aŭ gam-noto de la cela lingvo.

Ni esploru, por ekzemplo, la anglan kaj francan. La angla rivelas per sia strukturo la psikologion de la angloj, kies ĉefa historia karakterizo konsistas en ilia ŝato kaj inklino por la agado. Ne surprize do, ke la komun-uza vorto-provizo de la angla (lingvo de homa agado) havas

unusilaban karakteron, ĉar la agema homo vivas en la nuno, kaj la nuno estas momento sen sufiĉa loko por pli ol unu silabo. La vortoj plursilabaj nomiĝas kelkfoje en la angla *dictionary words* (vortaro-terminoj) t.e. vortoj de intelektuloj, vortoj de libro-vermo, vortoj esence neanglaj. La angla do estas modelo de dinamika lingvo kaj prononciĝas ĉefe per la dentoj kaj la palato.

De sia flanko, la franca prezentas lingvan evoluon tute diferencan de la angla. La francaj vortoj similas al geometriaj projekcioj de la latinaj praformoj, ŝajnas perdi ilian konsiston kaj koloron, kaj tian fenomenon oni povas konsideri kiel la lingvan manifestiĝon de la intelekta kaj abstrakta tendenco de la franca spirito, kies inklino al la klareco kaj ekvilibro bone evidentiĝas en la harmonia proporcio ekzistanta inter la vokaloj kaj la konsonantoj de lingvo, kiun oni ĉefe prononcas per la dentoj kaj la lipoj.

Ĉi tio rivelas, ke la diversaj karakteroj de la naciaj lingvoj, ties malsama ondolongo kaj, kelkfoje, ties diverĝaj spiritoj ne permesas la plenan transverŝon de unu en alian. La lingvoj ne estas likvoj facile adapteblaj al la formo de ajna vazo, sed subtilaj parfumoj, kies aromo parte perdiĝas kiam ili fluas de flakono en flakonon. Kio en la angla, por ekzemplo, sonas kiel piana melodio, tio redoneblas en la franca kiel nur violina muziko.

Don Quijote en la hispana, *Don Quijote* en la franca kaj *Don Quijote* en la angla estas la sama *Don Quijote* kaj tamen, leginte ilin, unu post alia, oni ricevas la impreson, ke ni admiris unu saman pejzaĝon, sed laŭ la personaj interpretoj de tri diversaj pentristoj. Sur la tri toloj vidiĝas la ĝeneralaj linioj de sama strukturo, tamen la intenso de la koloroj, la ekvilibro de la masoj, la ritmo de la perspektivoj rimarkeble distancigas unu pejzaĝon de alia.

Kompreneble, la tradukisto bone scias, kiel dirite, ke li ne povas transiri certajn limojn. Kaj tion iel konscias ankaŭ la ĝenerala publiko, kiu facile imputas al la nekompetenteco de la tradukisto la pli malpli grandan gradon de diverĝo inter originalo kaj tradukita versio. Ne

malofte, la publiko pravas, ĉar elstaraj tradukistoj, kiel elstaraj nacilingvaj romanistoj aŭ poetoj, ne abundas. Sed ĝi ŝajne ne vidas, ke ĉiaj interhomaj komunikoj, eĉ la komunikoj inter la cerbo kaj la koro de ĉiu unuopa persono, neniam sukcesas plene interkontaktiĝi, kio kondamnas nin vivi en spirita soleco multfoje tragika.

Resume do, en la tradukoj de naciaj al naciaj lingvoj ĉiam ekzistas ia nuanco nekonkerebla, ia freŝo neredonebla, ia koboldo, kies rondajn piedojn ni ne povas meti en kvadratajn ŝuojn. Kaj jam ni venas al la kerno de nia prelego: kiel ĉi-rilate kompareblas Esperanto al la naciaj lingvoj?

Nu, esence Esperanto kondutas kiel la ceteraj naturaj lingvoj kaj, kvankam mankas al ĝi speciala karakterizo nacia, tamen ĝi posedas propran spiriton, kiu fontas de ĝia gramatika strukturo kaj de ĝia hind-eŭropa vorto-trezoro kun ties kulturaj kaj emociaj asociacioj. Sed, kiel ni poste vidos, oni bezonas refortigi ĉi tiun spiriton kaj doni al ĝi grandan reliefon kaj koheron.

La tradukisto de Esperanto estas speco de heroo, kiu spitas la drakojn de la mezepokaj legendoj kaj, plej mirinde, fojfoje venkas ilin. Ĉar ni ne devas trompi nin. Esperanto suferas severajn limigojn kaj tion devus meti al si en la kapon multaj el niaj propagandistoj kaj pluraj el niaj esperantologoj kaj verkistoj.

La tradukisto de nacia lingvo al nacia lingvo disponas abundon de vortaroj, de referencaj verkoj, de ĉiaspecaj fakaj libroj por la plej bona plenumo de sia tasko. La tradukisto de Esperanto havas nur la *Plenan Ilustritan Vortaron*[2], kaj la *Esperantan Proverbaron*[3]. La nacia tradukisto ĝuas la dum jarcentoj akumuliĝintan trezoron de preskaŭ senlima frazeologio, de slangaj esprimoj, de apartaj parolturnoj, preskaŭ ĉiam ekvivalentaj kaj respondaj al la similaj apartaĵoj de la tradukata lingvo. Kaj ni, kompatindaj, havas nur... la aglutinecon, tian specon de ŝtono de la filozofoj, de mirindaĵo ĉiosolva, kaj la sistemon de afiksoj.

Tamen, la vero estas, ke la vortokrea dinamiko de Esperanto ne povas konkuri, per ĝia aglutina strukturo, kun la riĉo kaj subtilo de la

naturaj lingvoj analizaj. Kiam mi pensas, ke Esperanto havas nur *monto, monteto, montego* kaj *altaĵo* por kovri la semantikan spektron de la hispanaj *monte, montecillo, montaña, loma, otero, cerro, macizo, colina, morro, alcor, altozano, cabezo, teso, elevación, altura*, ktp mi ne povas ne sperti senton de doloro antaŭ la paŭpereco de nia lingvo. Kiam mi pensas, ke Esperanto havas nur *ĵeti* por kovri la spektron de la anglaj *throw, fling, cast, pitch, toss, jerk, hurl, heave* ktp kun ties diversaj semantikaj nuancoj, mi miras, ke oni aŭdacas skribi, kiel aŭdacis s-ro Ockey en sia *"Leksikono de Oficialaj Vortoj"*,[4] ke *"vortoj formitaj el la 4.535 oficialaj Esperantaj radikoj povas sufiĉe esprimi la sencon de la 414.825 apartaj vortoj sidantaj en la dek tri volumoj de la plena Oxford English Dictionary"*.

Resume do, la ĉefaj malavantaĝoj de Esperanto kiel tradukilo, kompare kun la naciaj lingvoj estas: anemia vortoprovizo, manko de sufiĉaj frazeologiaj kliŝoj kaj de esprimoj fakaj kaj familiaraj.

Kiam William Auld diras en sia artikolo *"La internacia lingvo kiel belarta tradukilo"*[5] ke *'la decida faktoro en tradukado, la sola kondiĉo por ĝia ebleco aŭ neebleco estas la talento de la tradukanto'*, tia aserto, el la buŝo de kompetenta tradukanto kaj bona poeto, ŝajnas des pli neimagebla. Estas konata fakto, ke en ĉiuj naturaj lingvoj ekzistas verkoj absolute netradukeblaj senrigarde al la pli malpli granda talento de la eventuala tradukisto. Ĉu ni ne havas, en la propra Esperanta beletro, kelke da libroj, kies redono en ajnan naturan lingvon tute ne eblas? Se Auld entreprenus kaj sukcese finus la tradukon en la anglan de *Kun siaspeca spico*[6], de nia karmemora Schwartz, tiam mi publike konfesus mian eraron kaj pentofare legus tricent sinsekvajn fojojn lian *Infana Raso*.[7]

Kiam en la sama artikolo, Auld asertas, ke *'la sistemo de afiksoj kaj vortkunmetado ebligas atingi altan nuancecon... kaj donas al la semantiko de la lingvo samtempe grandan elastecon kaj precizecon'*, evidente, li parolas, ne kiel artisma uzanto de la lingvo, sed kiel teoria propagandisto. Ĉar la malo okazas ofte. Multajn vortkunmetojn oni devas lerni kvazaŭ simplajn radikojn, tial, ke la kombino de iliaj ele-

mentoj donas kiel rezulton, ne precizan koncepton, sed ian konfuzan kaj nebulan ideon. Kie troviĝas la granda elasto kaj precizo de, por ekzemplo, la klasika "eksedziĝo"? Kio fakte signifas "iĝi eks-edzo"? Ĉu eble ne "vidviĝi"? Miaj gelernantoj de Esperanto estas sufiĉe kleraj kaj inteligentaj, tamen neniu el ili sciis ĝis nun, per propra analizo, diveni la sencon de "falŝirmilo". Ĉu bastono? Ĉu balustrado? Kaj ne sen surprizo lernas ĝian konvencian signifon de "paraŝuto". Kiam oni legas en PIV, ke *reprilabori* signifas *uzi la defalaĵojn de la unua prilaborado*, tiam oni devas agnoski, ke la tiel laŭdata precizeco, se ne paroli pri eleganto kaj elasto, de la vortkunmetado kaj de la sistemo de afiksoj, ekzistas nur en la bela regiono de la teorio kaj de la bonaj deziroj.

Alia malavantaĝo de Esperanto kuŝas en tio, ke dum la naturaj lingvoj havas difinitan, propran spiriton, Esperanto hezitas inter du tendencoj, samtempe strukturaj kaj stilistikaj, kio donas al ĝi ian provizorecon, ian mankon de baza solido. Temas pri ĝia duobla vizaĝo analiza kaj sinteza, aŭ, se vi volas, naturalisma kaj skemeca. Ŝajnas al mi, ke, feliĉe kaj nerevokeble, Esperanto iras definitive sur la vojon de la naturalismo, pro la simpla motivo, ke nia tipo de scienca kaj teknika civilizo, kun siaj postuloj de precizo, klaro, koncizo kaj subtila nuancado de la ideoj, ne havas paciencon por manipuli lingvon, kies terminoj estas fakte ne vortoj, sed priskriboj de nocioj, kiuj, malgraŭ ĉio vidiĝas ne klare difinitaj, kaj tro longaj kaj pezaj por plua derivado.

Estas nedubeble, ke Zamenhof imagis sian lingvon kiel du-ŝtupan sistemon. Sur la unua ŝtupo Esperanto devus logi kaj altiri al si partianojn dank' al la kvazaŭ koda simplo de sia mekanismo. De tio venis la svarmo da sintezaj formoj en la lingvo, la priskribaj kunmetoj rigide lignecaj mankaj je vivaj asociacioj, la kvazaŭ rutina deĉifrado de sekaj esprimoj... Sed Zamenhof rezervis sian lingvon por pli alta destino, kaj li mem, prudente kaj lerte kondukis Esperanton iom post iom al la naturalisma vojo. Jam en la jaro 1891 en *La Esperantisto*, Zamenhof skribis "Pri la uzado de formoj simplaj anstataŭ kunmetitaj": "... *En tu-*

te ni konsilas pli uzadi ĉiam formojn simplajn, anstataŭ kunmetitaj. Kunmetado de vortoj estas karaktera eco de la lingvo germana, kaj al ĉi tiu lingvo ĝi efektive donas grandan riĉecon de formoj; sed en nia lingvo, la vortoj pleje estas pli naturaj kaj pli bonsonaj, se ili ne estas kunligitaj, sed uzataj aparte". Oni atentu, ke li eksplicite uzis la vorton "naturaj". Por refortigi ĉi tiun tendencon, Zamenhof kreis grandan nombron da neologismoj, kiel estas bone konate. Kaj ne temis ĝuste pri neologismoj necesaj por la difino de novaj nocioj, sed ofte pri anstataŭaj neologismoj, formoj analizaj en la loko de sintezaj esprimoj. Al Zamenhof apartenas, por ekzemplo, *amara, aflikti, efemera, kvereli, stulta, milda, ŝrumpi, falsa, fiaski, strikta...* anst. la pezaj *maldolĉa, malĝojigi, maldaŭra, malpaci, malsprita, malsovaĝa, malŝveli, malvera, malsukcesi, malvasta...* Kaj oni ne pretekstu, ke tion postulis la bezonoj de la Esperanta poezio, ĉar, en la pioniraj tempoj, la terura adasismo, alia manifestiĝo de la kodeca karaktero de Esperanto, regis suverene.

Nu, apud ĉi tiu pozitiva, centrifuga dinamiko, aperas ankoraŭ tradukoj, kiuj ŝajnas kompendio de lingvo ankrita en la primitivaj, ĉifraj procedoj de la propaganda Esperanto; tiamaniere nia lingvo prezentas duvizaĝan spiriton: unu, progresan; alian, regresan. Se oni legas, por ekzemplo, *Johano la Brava*, de Petöfi,[8] en traduko de nia bedaŭrata Kalocsay, kaj *Nuda inter lupoj* de Bruno Apitz,[9] en traduko de Karl Schulze, oni sentas, super la diferenco de traduka talento inter la hungaro kaj la germano, ke la sukceso de Kalocsay ŝuldiĝas grandparte al tio, ke li teniĝis al la principoj, kies fekundan krean povon jam montris Zamenhof, dum Karl Schulze kvazaŭ baraktas en la primitiva Esperanto de la pasinta jarcento kaj produktas version sekan, palan, tiel similan al la originalo, kiel morta birdo pajloremburita povas simili al birdo viva kaj trilanta.

Esence, simila duvizaĝeco rimarkeblas en la angla rilate al la konstruo de la lingvo. Sed en la angla triumfis la anglosaksaj formuloj super la latinidaj, kaj kvankam la du specoj kunvivas en pli malpli produktiva simbiozo, la anglosaksaj elementoj donas al la lingvo ties definitivan

karakteron kaj ties internan koherecon.

Ni devus klopodi atingi en Esperanto similan kompromison. Sed oni ne misinterpretu min. La afiksa sistemo, la konjugacio, la gramatika rolo de la vokalaj finaĵoj, la vortoformado donas al la lingvo ties genian karakteron, formas la netuŝeblan, kaj netuŝindan, fundamenton de Esperanto. Sed ĉio ĉi konsistigas la armaturon de la lingvo, la skemon, se tiel diri, kaj mi pledas nur, por ke konscie kaj metode ni klopodu pli bone tegi la necesan, sed fridan kaj monotonan mekanismon de la Esperantaj strukturoj, per la vivaj koloroj de la naturalismo.

Oni eble miros, ke mi, ŝajne tiel skeptika rilate al la valoro de Esperanto kiel traduka lingvo, tamen aktive kaj preskaŭ ekskluzive laboras en la kampo de la tradukado. La afero ne estas tiel paradoksa, kiel ĝi unuavide ŝajnas. Zorge analizante la mankojn de Esperanto en komparo kun la naciaj lingvoj, oni baldaŭ konkludas, ke tiaj mankoj estas akcesoraj, forigeblaj, ne bazaj kaj neripareblaj kiel estis la kazo de Volapük. Okazas nur, ke Esperanto suferas karencan malsanon, kiun mi nomus anemio je naturalismaj elementoj. Sed de tia malsano nia lingvo povas liberiĝi dank' al sia esence solida bonstato, se nur oni aplikas al ĝi la taŭgan medikamenton.

Se jam nun Esperanto kapablas brile venki en tiel altaj entreprenoj kiel, por ekzemplo, la kaloĉajaj tradukoj el Petöfi, Heine kaj Shakespeare, oni pensu, kion oni povos atingi en la futuro, per Esperanto pli riĉa, pli elasta, pli elvokiva, pli natura, pli nuancita, pli unueca en ties esprimomaniero kaj, samtempe, pli kapabla redoni, en netaj reliefoj, la kontraston de la diversaj literaturaj stiloj.

Kiamaniere disvolvi ĉi tiun modernan Esperanton? Ŝajnas al mi, ke la respondo estas simpla: per la minimuma uzo de la mekanikaj rimedoj: afiksoj, kunmetaĵoj; per la zorga elekto de simplaj kaj esprimivaj vortoj kaj per la enkonduko de neologismoj. Mi scias, ke ĉi tiu lasta propono renkontos ankoraŭ la aŭtomatan oponon de multaj esperantistoj, sed, ĉar la temo meritas pli longan kaj detalan pritrakton, ni revenos al ĝi en alia prelego.

Estas kurioze kaj pripensinde, ke pro ia speco de instinkto, niaj aŭtoroj, kiam ili verkas originale, teniĝas ĝenerale al la analizaj principoj skizitaj ĉi-supre kaj donas al ni prozon pli brilan, fluan kaj viv-aspektan ol la prozo de iliaj tradukitaj pecoj. Oni komparu, por ekzemplo, *Homoj sur la Tero*[10] kaj *Gösta Berling*,[11] respektive originalan verkon kaj tradukon de Stellan Engholm, aŭ la originalojn de Luis Hernández kaj ties version de la novelo de Cervantes *La malprudenta scivolulo*,[12] por konstati kia grandega diferenco kuŝas inter originaloj kaj tradukoj rilate al la uzo de Esperantaj esprimorimedoj.

Antaŭ rigida, pala, sensuka, teda kaj ofte konfuza Esperanta traduko, plena de komplikaj vortokunmetoj kaj retorditaj fraz-aranĝoj, oni kelkfoje imputas la fuŝon al la influo de la originala lingvo. Efektive, tia faktoro ekzistas, sed ne klarigas la tuton de la fenomeno.

Ĝenerale okazas, ke nia tradukanto, konscie aŭ nekonscie konvinkita pri la neelĉerpebla, vortokrea dinamiko de la aglutineco, klopodas redoni per eta radikaro la pompan riĉon de la naciaj lingvoj, kaj torturante sian paŭperan terminologion per konstanta ĵonglado de afiksoj, kunmetoj kaj strangaj parolturnoj, li fine kreas ion nedigesteblan, foje eĉ groteskan, sen apenaŭ rilato kun la originalo.

Ni devas sobre alfronti la realon. La vero estas, ke mankegas al ni nuancigaj terminoj, fakaj vortoj, familiaraj esprimoj, kliŝoj, idiotismoj, unuvorte la karno de la lingvo; kaj ĉion ĉi ne povas adekvate provizi la sintezaj rimedoj.

De tempo al tempo flagras en la Esperanta gazetaro vivaj polemikoj pri tio, ĉu la originala verkado pli konvenas al la lingvo ol la tradukoj, aŭ inverse. Ĉar ni, esperantistoj, estas batalema tribo, kvankam ni ŝatas paroli pri paco, konkordo kaj interna ideo, tiaj polemikoj kelkfoje akiras la tonon de akra kverelo. Ĉu ne stulte? En Esperanto necesas originaloj kaj tradukoj, kiel en la naturaj lingvoj, kaj la fakto, ke oni verku originale aŭ traduke, devas dependi de tio, ĉu la verkisto havas talenton por unu fako, por la alia... aŭ por ambaŭ samtempe.

En la lasta, kaj ŝajne finofara, numero de *Norda Prismo*, januaro

1974, Verloren van Themaat[13] tuŝas denove la aferon en artikolo, kies moto mem estas tre signifa: *"Ajnon krom vin traduki abomenu"*. Edwin de Kock. *"(E) pistolo al poetoj tro tradukemaj"*. Kaj interalie, li asertas: *"Literatura tradukado evoluigas kapablojn mikrostilajn, sed neniujn aliajn. Tial troa okupiĝado pri tradukado kreas la danĝeron de troatento de la mikrostilo kaj malatento de ĉio alia"*.

Ni klarigu, ke Verloren van Themaat nomas mikrostilo la efikan aranĝon de vortoj al frazoj per rimedoj de vers-melodio, vortludoj, vortformado, vortordo ktp. Kaj li aldonas: *"Sed atentu bone, ke la valoro de neniu majstroverko de la monda literaturo kuŝas nur en la mikrostilo."*

Mi ne povas kompreni la aserton de Verloren van Themaat. Se oni tradukas verkon de ordinara, senornama stilo (kio ne signifas, ke ĝi ne povas esti samtempe terure subtila kaj plena de malfaciloj de traduka vidpunkto), mi ne vidas kiamaniere tia traduko povas fali en mikrostilismon, des malpli se la tradukisto scias sian oficon. Oni permesu al mi diri, el mia propra sperto, ke la hispana originalo de *La arbo de la sciado*[14] havas plej simplan, eĉ antistilan prozon. Tamen ĝia tradukado fariĝis al mi longa kaj nervostreĉa tasko, ĉar mi alfrontis, ne retorikajn efektojn aŭ lingvajn rafinajojn, sed la problemon redoni la nedifineblan spiriton de la originalo, kie natureco de la formo kaj precizo de la ideoj kunfandiĝas en tio, kio nomiĝas la ega malfacilo de la simplo.

Verloren van Themaat faras eĉ pli strangan aserton: *"... La filozofion de la verko, la rakonton, la karakterojn kaj situaciojn, la dialogojn, ĉion ĉi li* [la tradukisto] *ne bezonas eltrovi denove: ĉiuj tiaj kvalitoj konserviĝas kvazaŭ aŭtomate en la traduko."*

Kvazaŭ aŭtomate! Ho ve, kiel bedaŭrinde, ke la afero ne estas tiel simpla! Antaŭe ni jam sufiĉe parolis pri la multflankaj problemoj, parte nesolveblaj, kiuj sieĝas al la tradukistoj, eĉ kiam ili laboras super la ŝajne plej sensignifa traduko. Cetere la nura mikrostilo ne meritas la atenton de konscia tradukanto, ĉar plej ofte ĝi estas netradukebla – kaj netradukinda – speco de subliteraturo.

Resume do, ne originaloj aŭ tradukoj, sed tradukoj kaj originaloj. Nur oni ĉion mezuru laŭ la kriterio de la kvalito: bona traduko valoras pli ol cent aĉaj originaloj, kaj bona originalo valoras pli ol cent aĉaj tradukoj.

III.

LA PROZAJ VERKOJ TRADUKITAJ EN ESPERANTON

Mia nuna prelego temas pri la prozaj verkoj tradukitaj en Esperanton, konsideritaj de historia kaj kritika vidpunktoj. Nu, mi rapidas sciigi vin, ke mi ne intencas submeti vian paciencon al provo per la recito de longaj listoj da libroj kun aldonaj notoj pri ilia literatura gravo kaj pri la laŭdindaj kaj kritikindaj punktoj de ilia Esperanta versio.

Mia celo estas, surbaze de tiaj verkoj, fari kelkajn konsideroĵn pri nia traduk-arto kaj eltiri el ili kelke da konkludoj.

Estas rimarkinde, ke de la komenco de Esperanto ĝis nun, komparo inter la divers-epokaj Esperantaj originaloj kaj tradukoj montras, ke, dum la originaloj preskaŭ ĉiufoje prezentas lingvon nature konstruitan en stilo eminente legebla, la tradukoj, de sia flanko, karakteriziĝas de abruptaj varioj en sia stila valoro, se ne paroli pri la grado de fidelo – aŭ pli ĝuste, de malfidelo – al la respektivaj originaloj.

Rilate al la originaloj, oni legu, por ekzemplo, la antologion *"Tridek tri rakontoj"*[15]: jam de la unua peco, *Alpa rozo*, verkita de Magnus Nordesvan en 1898, t.e. en la unuaj jaroj de Esperanto, ĝis la lasta novelo *Simpla konfeso*, verkita de la hungaro László Böti en 1961, montriĝas konstanto de natura kaj ĝuebla stilo. Atentu bone, ke mi ne parolas pri specife literatura valoro, sed pri ia karakteriza komuna linio de interpreto kaj uzo de la naturalismaj esprimomanieroj de la lingvo, kio estas des pli signifa, se konsideri, ke la 29 aŭtoroj de la libro apartenas al preskaŭ 20 diverslingvaj nacioj.

La sama fenomeno de parenceco naturalisma – en la kadro de la logikaj diferencoj de stilo fontantaj de la personeco de la aŭtoroj kaj de ties temoj – facile rimarkiĝas en la pli ampleksaj kaj ambiciaj verkoj originalaj: *Vivo de Zamenhof*, de Privat,[16] en 1921; *Abismoj*, de Jean Forge[17] kaj *Idoj de Orfeo*, de Bulthuis,[18] en 1923; *Pro Ištar*, de Luy-

ken,[19] en 1924; *Viktimoj*, de Baghy,[20] en 1925, *Metropoliteno*, de Varankin,[21] en 1933; *Mistero minora*, de Szilágyi,[22] en 1928; *Kiel akvo de l'rivero*, de Schwartz[23] kaj *Vivo kaj opinioj de Majstro M'saud*, de Ribillard,[24] en 1963, povus taŭgi kiel ekzemploj de nia aserto.

Fronte al ĉi tiu linio de la originaloj, sen apenaŭ ascendoj kaj descendoj en ĝia lingva tono, la linio de la Esperantaj tradukoj, kiel dirite, tiriĝas tre neregule, kun nur malmultaj pintoj kaj longaj fosoj intere. Por ekzemplo, la *Fundamenta Krestomatio*,[25] aperinta en 1903, montras malforton en siaj tradukitaj pecoj. Prave ilin kritikis de Beaufront en letero de la sama jaro al Bourlet: "*En efektiveco, ĉe pli ol la duono, la Fundamenta Krestomatio prezentas al ni, ne la stilon de la doktoro* [Zamenhof], *sed la stilon, apenaŭ reviziitan, de personoj, kiuj plejparte scias nur iomete Esperanton, kaj ne estis kapablaj elekti bonajn tekstojn, ĉar ili estis nekapablaj ilin traduki kaj iafoje ilin bone kompreni.*"

Interparenteze mi diru, ke ankoraŭ en niaj tagoj oni propagandas la modelecon lingvan de ĉi tiu libro, kies ekzempleroj, se oni obeus la sanajn rekomendojn de responsa kritiko, devus strike rezerviĝi al la historiistoj kaj eruditoj de Esperanto, kaj neniam iri al la manoj de niaj lernantoj aŭ nove bakitaj esperantistoj.

Nu, iom poste aperas la vere brila kaj impona traduko de K. Bein (Kabe) "*La Faraono*",[26] kies versio, eĉ se iom senkarna kaj sennuanca, montras la perfektan adekvatecon de nia lingvo, (malgraŭ ties tiamaj, kaj nunaj, limigoj) por la rolo traduka. Sed tio estas kvazaŭ insulo en la maro de nekalkuleblaj tradukoj, kiuj meritas nur putri en la rubujo. Eĉ Zamenhof mem, tradukanto el pluraj lingvoj, postlasis al ni versiojn de tre diversa kvalito: *Marta*,[27] por ekzemplo, superas lian version de la *Fabeloj*,[28] de Andersen, kaj rilate al la tiel laŭdata *Malnova Testamento*,[29] li ĝin verkis per lingvo tro skemeca, kun abundaj esprimoj nenaturaj kaj retorditaj, eble pro pia respekto al la laŭliterisma tradicio tiam sekvata de la diversnaciaj tradukantoj de la Sankta Libro.

Dum la titoloj de la bonaj tradukoj prozaj en Esperanto okupus

la spacon de nur kelkaj linioj, la titoloj de la fuŝaj tiriĝus tra dekoj da paĝoj. Efektive, necesas alveni al la jaroj de Literatura Mondo,[30] fondita en 1922, kaj al la genia figuro de nia karmemora Kalocsay por ĉeesti la naskiĝon, kiel skolon, de la naturalismo aplikata konscie al la Esperanta traduk-arto. Tamen, malgraŭ sia evidenta supereco, la tradukoj aperintaj rekte ĉe Literatura Mondo, aŭ en aliaj lokoj sub ĝia influo, ne fariĝas modelaj kaj normigaj ĉie, kvankam ili kreas fortan precedenton.

En 1925 aperis la siatempe ĝenerale laŭdata *Kataluna Antologio,*[31] en kies prozaj pecoj – kelkaj el la versaj meritas alian takson – Esperanto reduktiĝas al rigida lingvo koda, tiom, ke nur la entuziasmo de la unuaj pioniroj kapablus trovi en ĝi ian signon de suka vivo. La riproĉon de Beaufront al la *Fundamenta Krestomatio* oni povus apliki des pli prave al ĉi tiu antologio, reeldonita certe ne pro la meritoj de ties traduko en la jaro 1931.

Sed en la *Hungara Antologio,*[32] jaro 1933, kaj en la *Ĉeĥoslovaka,*[33] jaro 1935, denove brilis la Esperanta traduk-arto en sia plej pura esenco per la arta stilismo, ne nur de Kalocsay kaj Tárkonyi en la hungara verko, sed de O. Ginz, Stan. Kamaryt, Miloš Lukaŝ kaj Tomaŝ Pumpr en la ĉeĥoslovaka.

En 1930 SAT eldonas *La Fera Kalkanumo,*[34] de Jack London, en traduko de Georgo Saville. Se efektive oni lernas per la eraroj, oni devus trudi la fundan studon de ĉi tiu versio por instrui, kiel oni ne devas traduki en Esperanton, ĉar ĝi estas apoteozo de laŭliterismo, de konstanta uzo de la mekanikaj rimedoj de la lingvo, de senanima kaj sensanga skemeco, kaj krome, apogeo de aberacia uzo de kompleksaj verboformoj. Gustumu kun mi almenaŭ specimenon, ne speciale elektitan, el la teksto. Jen, por ekzemplo:

"Juĝistaj malpermesoj estis al li donataj. Tamen li persistis. Ĉar li malobeis al la malpermesoj, li estis kontraŭprocesata kaj kondamnata al sesmonata malliberigo pro justec-malestimo."

Kaj tion oni skribis – kaj eldonis kaj eĉ vendis! – multajn jarojn post la apero de *La Faraono.*

En 1937, *La naiveco de Pastro Brown*,[35] de Chesterton, en traduko de d-ro Bean, daŭrigas la plorindan tradicion elsuĉi ĉian vivan esencon el la korpo de Esperanto, malgraŭ tio, ke la tradukinto povintus lerni pli bone sian oficon, legante kun atento la brilan version de *Quo Vadis?*,[36] de Sienkiewicz, faritan de Lidia Zamenhof, aŭ de *La sorĉistino el Kastilio*,[37] de Salomon Asch, faritan de Lejzerowicz, aŭ eĉ de *Tri homoj en boato*,[38] de Jerome, faritan de Badash.

Sed mi ne rajtas daŭrigi mian litanion. Kiel dirite, mi intencas, ne doni senfinan liston de Esperantaj tradukoj, sed nur ilustri per kelkaj ekzemploj, nombron da interesaj faktoj.

La unua el ili estas, ke, kvankam ekzistas en nia literaturo multe pli granda kvanto da tradukoj ol da originaloj, proporcie la originaloj nete superas la tradukojn rilate al la vivanteco de la stilo, la freŝo de la lingvo kaj la uzo de naturalismaj formoj.

Tia fenomeno ŝuldiĝas al diversaj faktoroj: 1) verki originale postulas jam antaŭan literaturan trejnadon aŭ sperton, kio nepre draste limigas la nombron da originalaj aŭtoroj; 2) ili havas sufiĉan teknikon kaj lingvan senton por sia tasko; 3) ili devas, ne klopodi redoni la formon kaj la ideon de difinita aŭtoro kiel eble plej fidele, sed interpreti sian propran penson en sia propra stilo, kun la avantaĝo, ke ili povas laŭplaĉe interakordigi penson kaj stilon, sen submetiĝi, kiel la tradukisto, al alies fiksaj skemoj; 4) ili povas reverki sian unuan manuskripton multfoje, ĝis ili atingas la deziratan formon, kion la tradukisto ne povas fari tiel libere, ĉar lin limigas la ŝuldata respekto al la originala teksto kaj ties partikularaĵoj; 5) la krea kaj estetika instinktoj de la originalaj aŭtoroj movas ilin uzi vortojn kaj esprimojn kun propra, aŭtonoma vivo kaj ordigi sian tekston laŭ pli malpli artismaj ritmoj.

Resume, la originalaj verkistoj manipulas lingvon esprimivan, naturan, elastan, ĉar nur per ĝi ili povas tuŝi la sentimentan aŭ intelektan emocion de la leganto. Ne strange do, ke la Esperantaj originaloj montras, super la tempoj kaj la skoloj, familian trajton karakterizatan de naturalisma lingvo-uzo sur tre bona nivelo. La originalaj Esperanto-

aŭtoroj estas – aŭ povus esti – profesiaj verkistoj, kaj iliaj libroj klare montras tion.

Nu, la psikologio de nia tradukanto estas, ĝenerale, multe pli kompleksa. Li estas homo kun kelka kulturo, scias Esperanton pli malpli bone – ofte malpli bone – kaj foje pro stranga ambicio aŭ sinmontremo, foje pro honesta, eĉ se misgvidata, deziro pozitive labori por la lingvo, li turnas sian atenton al la kampo de la tradukado. Nu, krei estas io komplika, tamen kopii ŝajnas facila tasko, li pensas. Li armas sin per nacia-Esperanta vortaro kaj, kelkokaze, eĉ per la Plena Ilustrita Vortaro; elektas libron, kiun li aparte ŝatas, sen konsideri, ĉu ĝi havas literaturan valoron esperantigindan, kaj metas manon al la laboro. La obstakloj komencas aperi jam en la unuaj linioj. Sed nia kuraĝa amiko ne cedas. Li havas obstinan naturon kaj krome, – ĉu li ne aŭskultas senĉese, jam de multaj jaroj, ke Esperanto, per sia manpleno da oficialaj radikoj povas, se oni ilin lerte kombinas, redoni senmanke centmilojn da vortoj de la naciaj lingvoj? Se tiel do, ĉio estas afero de pacienco, ĉu ne? Kaj kun senfina pacienco li klopodas traduki ĉiun nacian vorton en la originala teksto per responda vorto Esperanta, afiksumante kaj kombinante radikojn en la tre multaj okazoj, kiam li ne trovas puran radikon en Esperanto ekvivalentan al la tradukata esprimo. Tre ofte nia tradukanto ne scias aŭ konscias pri la delikataj problemoj, kiujn prezentas, ne la nura vortotraduko, sed la traduko de ritmoj, psikologiaj atmosferoj, retorikaj efektoj, intenso de aludoj kaj sugestoj, interakordigo de diversaj elementoj priskribaj kaj psikologiaj, ktp. Nu, nia amiko finas sian taskon, kaj ĝi ŝajnas al li la plej bela filo de lia talento, ĉar li vidas en sia versio la puran reflekton de la originalo kun ties tuta ĉarmo. Cetere li ne komprenas, pro tre konata sugestia fenomeno, ke li vere legas la tekston de la originalo, fiksitan en sia memoro, dum liaj okuloj glitas fojon post fojo sur la linioj de la traduko. Poste li montras sian produkton al Esperantaj amikoj, kiuj ĝenerale gratulas lin pro lia laboro, foje ĉar ili konas nian lingvon eĉ pli malbone ol nia tradukanto, foje pro simpla ĝentilo. Kaj li eĉ trovas bonvolan, sed same nescian kaj konfuz-

kapan samideanon, aŭ eble neesperantistan eldoniston kiu publikigas lian majstraĵon.

La dua fakto estas do, ke la tradukado pro sia ŝajne pli facila alireblo ol la originala verkado, altiras la atenton kaj fariĝas tasko de homoj sen la necesa kompetento, el kio rezultas la ĝenerale malalta nivelo artisma de la Esperantaj tradukoj, pro ties lingvo kodeca, manka je esprimaj kaj estetikaj valoroj.

Apud ĉi tiuj tradukemuloj, kiuj bonintence kaŭzas al Esperanto gravan damaĝon, ĉar per siaj versioj ili fuŝas Esperanton, ridindigas sian propran nacian lingvon, kaj semas en siaj legantoj nombron da malbonaj lingvaj kutimoj, troviĝas aro da veraj virtuozoj de la traduk-arto, kies produktoj montras la vere pozitivan vojon de evoluo: Kalocsay, Waringhien, Tárkonyi, Bernard, Rossetti, Auld, kaj kelkaj aliaj, kies tradukoj, laŭ la konsekrita formulo, legiĝas kiel originaloj.

Ili klopodas – kaj ofte atingas – rekrei originalon en artisman tradukon, ĉar ili studas la semantikan kampon kaj efikon de ĉiu vorto, elektas ilin zorge, metas ilin en ties ĝustan lokon en la frazo kaj, en konstanta lukto kontraŭ la paŭpereco de nia ĝenerala terminologio kaj kontraŭ la tento uzi kodajn esprimojn (ĉar fakte ili estas formoj de antiliteraturo, parencaj al adasismo) helpas sin per la naturalismaj solvoj de, almenaŭ, la teknikaj problemoj, se konsideri, ke, kiel dirite, aliaj transplantoj pli subtilaj kaj esencaj ne eblas en la kampo de la traduk-arto: ne nur de naciaj lingvoj al Esperanto, sed ankaŭ de naciaj al naciaj lingvoj.

Tiel do, la verkado kaj disvendo de escepte bonaj – kelkaj geniaj – tradukoj kun vivaj, naturaj formoj kaj riĉaj nuancoj, kaj samtempe la verkado kaj disvendo de multegaj versioj kun lingvo rudimenta, kvazaŭ rekte prenita el la paĝoj de *La neĝa blovado*[39] de Puŝkin aŭ de *La gefratoj*[40] de Goethe, en traduko de Grabowski, kreas la duvizaĝecon de la lingvo – foje natura kaj suka, foje skemeca kaj senviva – kaj tia diverĝo devus malaperi kiel eble plej baldaŭ favore al la progresaj, analizaj tendencoj.

Kion ni dirus pri nacia lingvo, kies aktuala literaturo esprimiĝus en iuj verkoj per la sintakso kaj la vortoprovizo de la mezepokaj tempoj, kaj en aliaj verkoj per modernaj esprimomanieroj kaj fruktuzo de naturalismaj rimedoj? Absurde, ĉu ne? Tamen, io simila okazas en nia nuna Esperanto, kun la bedaŭrinda konsekvenco, ke multaj esperantistoj ne scias distingi, en tiu pelmelo, la bonan de la malbona Esperanto.

Pri ĉi tiu konfuziĝo de la ordinaraj esperantistoj, tre kulpas ankaŭ multaj el niaj recenzantoj kaj specialistoj pri literaturo kaj gramatiko. Eĉ kleraj esperantistoj kiel T. Carlevaro, kunaŭtoro de tiel solida verko kiel *Esperanto en Perspektivo*,[41] uzas kapricajn, ofte ne proprajn kriteriojn, por juĝi la valoron de nombro da tradukoj, kaj tiel, por ekzemplo, li etikedas "epokfara" la kajeron *Liriko*,[42] kiu estas poemaro de Federico García Lorca en traduko de Gusev. Envere la kajero rimarkindas pro lia erara lingvo kaj pro la grotesko de liaj interpretoj. Aliloke, en la sama verko, Carlevaro diras laŭdajn vortojn pri Julio Mangada Rosenörn, iama famulo de la hispana Esperanto-movado.

Nu, Julio Mangada, armea generalo, estis bonulo, kiu sen gramatika scio verkis gramatikon; sen poeziaj tekniko kaj sentimento verkis poemojn; kaj sen traduka talento faris tiajn redonojn el la hispana, ke ili estas kvintesenco de absurdo kaj ekstravaganco.

Kompreneble, se respondecaj recenzantoj laŭdas tiajn verkojn kaj aŭtorojn, anstataŭ anatemi ilin, tio stimulas la plifirmiĝon de la eraraj tendencoj en la lingvo kaj helpas semi la konfuzon en la ne tre solidan lingvan juĝo-kapablon de la ordinaraj esperantistoj.

Ni bezonas sisteman kaj seriozan kritikon, laŭ la normoj uzataj en la naturaj lingvoj. Ni devus starigi esploran komisionon el senpartiaj kompetentuloj kun la celo, ke ĝi ekzamenu nian tradukan literaturon el evolulingva vidpunkto kaj difinu, kiuj libroj meritas rekomendon, kaj kiuj libroj devus esti klasitaj kiel lingvaj abortoj. Ĉi tio efikus pozitive, almenaŭ dumaniere: unue, niaj kuraĝaj tradukantoj rekonsiderus sian intencon entrepreni laboron, kiu povus meriti publikan, negativan pritakson de la komisiono; kaj due, la legantoj de esperantaĵoj, malgraŭ

la instigo de falsaj propagandoj aŭ de arbitraj recenzantoj, eble ĉesus akiri produktojn el lingva analfabeteco ofte maskata sub pretendoj de klasikismo kaj tradicia lingvo-uzo.

Sed tia komisiono devus labori konscience kaj, precipe, sen doni atenton al eksterlingvaj konsideroj, kiel la kategorio de la tradukanto, de la eldonejo aŭ de eventuala mecenato. Se io estus fuŝa, eĉ se kovrita per brila vesto kaj per ekstravaganca propagando, la komisiono devus senhezite proklami ĝian fuŝecon. Ĝi dirus, por ekzemplo, ke la *Dia Komedio*,[43] en traduko de Peterlongo, estas monumenta aborto kun nur tri laŭdindaĵoj: bindo, papero kaj tipografio, kaj ke lingve ĝi valoras malpli ol du bonaj sonetoj de Tárkonyi aŭ Geraldo Mattos. Ĝi dirus, por ekzemplo, ke *Faŭsto*,[44] en traduko de Barthelmess, terurus Mefistofelon mem, kaj ke, se Goethe resurektus kaj lernus Esperanton, li denove mortus, subite kaj definitive, se tian version de sia majstroverko li komencus legi en la internacia lingvo.

Sed tian komisionon oni neniam starigos, kompreneble. La lingvo devas, pene kaj perdotempe, fiksi iom post iom la normojn de sia evoluo, ĝis ĝi definitive postlasos la parazitan balaston de skemecaj formuloj kaj paŭpera vortoprovizo.

Ni jam klarigis tion, ke la ŝajna facilo de la tradukado tentas homojn sen la necesa kompetento literatura aktivi en la traduka kampo, kio siavice klarigas la abundon de fuŝaj redonoj en duonarkaika lingvo. Sed ekzistas ankaŭ la kurioza fenomeno de homoj, kies nedubebla talento, kiam ili verkas originale, ne funkcias sur la sama alta nivelo en la tradukado. Ni jam menciis ĉi-rilate, en la unua prelego, la nomojn de Stellan Engholm kaj Luis Hernández. La ekzemploj povus multiĝi. Kaj el tio ni alvenas al du konkludoj; unua: la tradukado, kontraŭ la opinio de tre multaj personoj, konsistigas apartan, malfacilan arton, ofte neatingeblan de parencaj profesiuloj de la tradukistoj, kiaj estas la originalaj aŭtoroj. Dua: oni devas gardi sin, aŭtomate laŭdi la tradukon de fama aŭtoro originala, nur ĉar li elstaras en la kampo de la originala literaturo. Eĉ en la tre eta nombro da eminentaj aŭtoroj same brilaj en

la originala kaj traduka verkadoj, unuj pli lertas en la tradukoj, aliaj en la originaloj. Por ekzemplo, Waringhien kaj Szilágyi ŝajnas iom pli perfektaj en la originaloj; Kalocsay iom pli perfekta en la tradukoj malgraŭ sia *Streĉita Kordo.*[45] Zamenhof mem legiĝas iom pli nature kaj flue en siaj originaloj, eble tial, ke li entreprenis tro ambiciajn tradukojn per lingvo ankoraŭ ne sufiĉe matura kaj elprovita; aŭ eble tial, ke lia talento pli nature adaptiĝis al la originala verkado.

Mi volas insisti ĉi tie, ke, kiam mi parolas pri la diversa valoro de aŭtoroj kaj tradukistoj mi strikte aludas ilian manipulon de la lingvo, ne la kalibron de ilia intelekto, aŭ la vaston de ilia literatura konstrukapablo.

Ĉi tio lasta meritus alispecan esploron, ĉar okazas, rilate al la Esperantaj tradukoj, ke estus ne seninterese klasi ilin ne nur de la vidpunkto lingva, sed ankaŭ de la vidpunkto de ilia literatura gravo. Kaj ni alvenus al la jena specimenigo:

1) Tradukoj lingve fuŝaj de verkoj literature negravaj
2) Tradukoj lingve bonaj de verkoj literature negravaj
3) Tradukoj lingve fuŝaj de verkoj literature gravaj, kaj
4) Tradukoj lingve bonaj de verkoj literature gravaj.

Por povi determini la procentojn de la kvar kategorioj de la Esperantaj tradukoj, mi bezonus tiun literaturan statistikon, tiel brile aplikatan de Henri Vatré al diversaj aspektoj de nia beletro; sed mi opinias, ke mi ne multe erarus, se mi kuraĝus asigni 50 procentojn al la unua kategorio, tio estas, al tradukoj lingve fuŝaj de verkoj literature negravaj; po 20 procentojn al la dua kaj tria kategorio, kaj apenaŭ 10 procentojn al la kvara kategorio, tio estas, al tradukoj lingve bonaj de verkoj literature gravaj.

Tio signifas, ke el imaga aŭtodafeo saviĝus nur, maksimume, dek procentoj de nia tuta tradukita literaturo proza. Rilate al la poezia, la procento de savindaj libroj signife reduktiĝus.

Konsiderante la ĝenerale povran valoron lingvan kaj teman de niaj tradukoj, oni ne povas ne bedaŭri la teruran elspezon de laboro, mon-

rimedoj kaj iluzioj preskaŭ vane forperditaj pro manko de mond-skala planado aplikenda al la metoda preparo de kadroj de kapablaj tradukistoj pretaj entrepreni la taskon sisteme traduki aron da naciaj verkoj elektitaj de specialistoj. Estas des pli ironie, ke ni, esperantistoj, kiuj fieras pri nia internacia mondkoncepto kaj nia tuthoma solidareco, eĉ ne kapablas solidariĝi por krei, per intima kunlaboro, seriozan produkton tradukan, kapablan veki la respekton kaj la interesiĝon de la skeptika mondo. Male, la individuaj personoj, la lokaj asocioj, la naciaj organizaĵoj iras ĉiu sian propran vojon kaj produktas mil sensignifajn rezultojn, preskaŭ ĉiam negativajn, anstataŭ starigi komunan entreprenon por la atingo de komuna celo ambicia.

Kaj tamen... Ne vidu en miaj vortoj eĉ ereton de pesimismo aŭ defetismo. Se malgraŭ la magraj rezultoj de nia lingvo post ĝia preskaŭ jarcenta ekzisto, se malgraŭ nia interna malharmonio, se malgraŭ niaj ofte negativaj kaj misgvidataj klopodoj, Esperanto vivas ankoraŭ kaj eĉ diversflanke progresetas, ni nepre devas pensi, ke io nedetruebla, kvazaŭ mirakla, tenas ĝin ĉiam piede: oni nomu ĝin interna ideo, aŭ intrinseka valoro de la lingvo mem, aŭ eĉ bela sonĝo. Ĉar, finfine, la sonĝoj havas multfoje kosman potencon. Ĉu Esperanto ne naskiĝis el la sonĝoj de Zamenhof?

FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO

IV.

LA POEZIAJ VERKOJ TRADUKITAJ EN ESPERANTON

Se la Esperanta prozo traduka iel diverĝas, en ĝeneralaj linioj, de la originala, kaŭze de sia pli alta grado de artefariteco, la saman fenomenon, sed iom pli komplikan, ni povas rimarki ĉe nia poezio. Efektive, la poezio formas kvazaŭ apartan blokon disde la prozo, ne nur tial, ke la vers-arto havas siajn proprajn leĝojn prozodiajn, sed ankaŭ pro tio, ke la poeto, pro la nepra koncizo de la versoj kaj pro ties ceteraj karakterizaĵoj, devas helpi sin per ĉiaj lingvaj rimedoj, en pli forta grado ol la proz-verkisto, por la redono de siaj sentaj kaj ideaj mondoj.

Dum la originala poeto povas pli malpli sukcese adekvatigi sian penson al formo elektita de li mem, la tradukanto de poezio devas redoni alies ideojn en la kadron kaj teknikon de la originala teksto. Tio metas la Esperantan poem-tradukanton antaŭ alternativo, kies solvo dependas de lia lingva sento kaj de lia scio de la ofico: aŭ li profitas ĝismaksimume la sintezajn rimedojn de Esperanto, aŭ helpas sin per la alpreno de neologismoj. En ajna kazo, la tradukitaj verkoj poeziaj senteble distanciĝas de la ordinaraj originaloj kaj tradukoj prozaj, kio kaŭzas, ke la ĝenerala publiko rigardas la poezian Esperanton kiel specon de dialekto kaj reagas al ĝi ne nur indiferente, sed kelkfoje eĉ malŝate.

Io simila okazas en la kulturaj lingvoj naciaj. Sed al la naciaj poetoj mankas legantoj, ne tiom pro la uzo de esoteraj esprimoj, kiom pro la subtilo de iliaj konceptoj. La granda poeto hispana Federico García Lorca uzis en granda parto de sia poezio ĉiutagajn, popolajn terminojn kaj parolturnojn, sed ili kaŝis ne facile alireblan mondon de profundaj simboloj. Kontraŭe, la Esperanta poezio ne ricevis sufiĉan akcepton de la flanko de la laika publiko, ĉefe pro siaj strangaj retordoj sintaksaj kaj sia tro granda skemeco, t.e. pro konsideroj pure lingvaj, ne konceptaj. En la okazoj kiam uziĝis lingvo pli natura kaj krome kon-

ceptoj senpene kompreneblaj – kiel ĉe Baghy kaj Kurzens – tiam la poezio estis iom pli populara.

Kaj tamen, la Esperanta poezio, precipe la Esperanta poezio traduka, estas viviga fonto, kampo de eksperimentado, kie foje blindepalpe, foje konscie-metode, la poeto preparas la futuron de nia lingvo. Pli ol la prozo, la poezio traduka prezentas pli da formaj problemoj, kio stimulas la krean povon de la tradukantoj: kaj se ili posedas vere artan talenton, tiam iliaj solvoj starigas precedenton kiel faktoroj de riĉigo kaj renovigo.

Nia traduka poezio komenciĝas per *Sinjoro Tadeo,*[46] de Mickievicz, tradukita de Grabowski en la jaroj de la unua mondmilito. Ĉio antaŭa, se escepti ion de Kofman, egalas al nura balbutado. Kun kia sento de amuzo kaj de nedifinebla tenero ni legas nun, por ekzemplo, la pecojn el la "modela" poezio de la Fundamenta Krestomatio! Ĉu vi memoras la tradukon de *Tri palmoj,* de Lermontov, fare de Solovjev?:

El inter la ĝiboj sin skuis en pendo
la larĝaj kurtenoj de tendo kaj tendo;
kaj ilin la brunaj manetoj levadis,
kaj nigraj okuloj el tie briladis;
arabo, talion al selo klinante,
peladis ĉevalon, al kur' instigante.

Dum ankoraŭ multaj jaroj, la Esperanta poezio vegetis en tiel infanecaj vestoj kaj eĉ en la nuna tempo aperas en anguloj de niaj revuetoj kaj bultenoj, poemoj – se ili rajtas ricevi tian nomon – komponitaj laŭ la modeloj de la Fundamenta Krestomatio.

Nu, Grabowski estas kurioza figuro, ankoraŭ ne sufiĉe studata. Kiam oni zorge legas liajn prozajn kaj versajn tradukojn: *La neĝa blovado, La gefratoj, Mazepa, Pekoj de l' Infaneco, El Parnaso de Popoloj, Postrikolto,*[47] oni ne bone komprenas, ke Kalocsay nomas lin en *Lingvo, Stilo, Formo,*[48] *'tia artisto de la lingvo'*, kaj ke en la *Gvidlibro por Supera Ekzameno,*[49] kvazaŭ en inerta ripeto de tradicia klišo, oni asertas, ke *"lia stilo* [de Grabowski] *estas klara kaj bone nuancita, tre*

proksima al la zamenhofa stilo."

Vere, kontraŭ tia aserto, Grabowski donas la impreson, ke li ne plene asimilis al si la spiriton de la lingvo, kion oni pli bone komprenas, komparante lian verkaron kun la libroj de lia samtempulo Kabe. *Sinjoro Tadeo* – kaj pardonu min, se mi diras ion skandale herezan – estas nelegebla pro sia teda, senfina fluo de monotonaj sepjamboj, pro sia eksceso de adasismoj, pro sia agace plata lingvo. Sed Grabowski havas la meriton de sia eksperimentemo, des pli originala, ĉar ofte, li helpis sin en sia traduko tiel per analizaj kiel per sintezaj rimedoj. Apud la uzo de granda nombro da neologismoj (kelkaj el ili, kiel "inkursio", ne troviĝas en la Esperanta-pola vortaro de Michalski nek en la Plena Ilustrita Vortaro) rimarkindas en *Sinjoro Tadeo* la ekspluato de forta skemeco lingva kun ties neevitebla ŝarĝo de artefaritaj efektoj, ĝis tia ekstremo, ke, kontraŭ la lingva uzado de Zamenhof mem kaj kontraŭ la strukturaj bazoj de Esperanto, li lanĉas formojn, kiuj konsistas el kunfando de substantivo kun ĝia adjektivo.

En sia *Lingvo, Stilo, Formo*, Kalocsay laŭdas la lingvan eltrovemon de Grabowski, kvankam ĉio ŝajne noveca, kiun Grabowski utiligis en *Sinjoro Tadeo*, jam vidiĝis ĉe aliaj aŭtoroj, por ekzemplo, la verbigo de substantivoj kaj adjektivoj ĉe Zamenhof kaj Kofman; la uzo de simpla *ĉi* anst. *ĉi (tiu-j), ĉi (tie)* ankaŭ ĉe Zamenhof; la participa sufikso antaŭ verba finiĝo estis objekto de komentario de la flanko de Zamenhof en *La Revuo*, en tiel frua tempo kiel 1907, kun mencio de la formo *as, is*, ktp. en la signifo de *estas, estis*, ktp.

Tiel do, rimarkinda ĉe *Sinjoro Tadeo* estas la kuraĝo de Grabowski profiti ĉion por sia traduko, senrigarde al tio, ĉu li helpas sin per naturalismaj aŭ per skemecaj elementoj. Simila fenomeno ne ripetiĝas laŭlonge de nia literatura historio, ĉar la naturalismo kaj la skemeco, kvazaŭ konsciaj pri sia fundamenta antagonismo, distanciĝas unu de la alia kaj formas apartajn tendarojn kun ties respektivaj porbatalantoj.

Ĝis la alveno de Kalocsay kaj de la plejado ariĝinta ĉirkaŭ Litera-

tura Mondo ekde 1922, la poezia traduko Esperanta (kaj cetere granda parto de la originala, se escepti iom de Privat) teniĝis al la tradiciaj formoj signataj de adasismo kaj skemeco. Kaj eĉ en tiel malfrua tempo kiel 1928, la *Belga Antologio*[50] *(Flandra Parto)* prezentas en siaj paĝoj ĉi-specajn versojn:

Ho, moviĝadanta akvobesteto
kun via nigra vesteto.
Mi amas kapeton vian glitantan
sur l' akvaj ondoj skribantan!

Pro pia respekto, la nomo de la tradukinto plu kuŝu en la profundo de la forgeso!

Kun Kalocsay kaj la Budapeŝta skolo la poezio, same kiel la prozo, akiras vere profesian rangon. Ili skuas Esperanton for de ĝia sterila rutino, riĉigas la lingvon per novaj vortoj kaj esprimorimedoj, faras ĝin pli elasta, natura kaj elvokiva. La partianoj de unugroŝa Esperanto (laŭ sprita difino de Gaston Waringhien en *Parnasa Gvidlibro*[51]) klamas al la ĉielo kontraŭ tia inundo de riĉo. Ili naskiĝis paŭperaj kaj volas, ne nur resti paŭperaj, sed ankaŭ ke la aliaj ne riĉiĝu. Kiel solan kapitalon ili deziras nur la minimuman *Fundamento de Esperanto* kaj la etan *Oficiala Vortaro...* la mirindan vortaron, kies kvar mil kelk terminoj povas transformiĝi, per la miraklo de la kunmetado kaj de la sistemo de afiksoj, en centmilojn da esprimoj. Kion do deziras ĉi tiuj poetoj? Nu, la poetoj deziras ne fridan kodon, senespriman kiel ĉio mekanika, sed vivon, lumon, varmon, koloron... unuvorte nature respeguli la naturon.

La kalocaja traduko de *Johana la Brava*,[8] aperinta en 1923, vidiĝas lumjarojn for de la ĝistiamaj poeziaj tradukoj — aŭ eĉ de la originaloj versaj — pro sia superba tekniko kaj sia natura, mirinde klara lingvo. Evidentiĝis, ke ne Grabowski, sed Kalocsay estas la patro kaj la renoviganto de la Esperanta poezio. Unu jaron poste, aperas lia versio de *La tragedio de l' homo*, de Mádach, kiu konfirmas lian tradukan majstrecon. Novan, brilan ekzemplon de sia virtuozeco li donas per

Eterna Bukedo en 1931, perdas iom da freŝo en *La Floroj de l' Malbono*, de Baudelaire, 1957, (eble pro la aparte rafinita stilo de la originalo) sed denove superas sin mem per *Kantoj kaj Romancoj*, de Heine, en 1969, kaj laste per *Reĝo Lear*, *Somermeznokta sonĝo* kaj *La tempesto.*[52]

En sia *Lingvo, Stilo, Formo*, Kalocsay diras, ke *Sinjoro Tadeo 'devus esti pritraktata en ĉiu supera kurso, studata de ĉiu poemtradukisto'*. Sed ververe, *Sinjoro Tadeo* fariĝis muzea peco, arkeologia resto, kie nenio lerneblas. Kion oni nepre devas studi, tio estas la propraj verkoj de la hungara aŭtoro, ĉar ili gardas trezorojn de eltrovemo, de tekniko, de inspiro kunfluantaj en lingvon vivo-vibran.

Kalocsay kaj lia skolo senkompromise partianiĝis al la naturalismo. La principo "la tradukoj legiĝu kiel originaloj, kaj la poezio kiel bona prozo" rivelis la celon de iliaj streboj. Ĝis kiu grado ili sukcesis?

Eminente, laŭ ĝeneralaj linioj. Sed ĉiuj: Kalocsay, Tárkonyi, Waringhien, Auld, Rossetti... ne povas eviti iam kaj tiam senvolan retropaŝon en la kodecon de la lingvo, kaj, legante kelkajn el iliaj versoj, oni klare perceptas, kiel ili baraktis por trovi la ĝustan redonon de la originalaj linioj, kaj kiel, antaŭ la manko de laŭa esprimo aŭ de nekaptebla nuanco, ili fine eltiris sin el la embaraso per strange nenatura vortordo aŭ per kunmeto priskriba, neelvokiva.

Sed ili havis, interalie, la grandan meriton starigi nivelon de kompetento, kies minimumo situas multe pli alte ol la maksimumo de niaj eminentuloj de antaŭaj jaroj. Tamen, malgraŭ la brilaj modeloj de la Budapeŝta skolo, abundas, ankoraŭ ĝis niaj tagoj, verso-ĉarpentistoj, kiuj uzas ĉiam la saman rustan instrumenton; ĉar, se la ŝajna facilo de la proza tradukado altiras niajn verkemulojn (kaj oni atentu tion, ke malmultaj el ili scias aŭ kuraĝas beletri en sia nacia lingvo), la vers-arto havas eĉ pli grandan fort-altiron pro la facila rimebleco de Esperanto, kaj krome, la traduko de poemo ne postulas tiom da tempo kiom la traduko de rakonto aŭ novelo. Tiel do, la distanco inter la bona kaj la fuŝa poezio estas eĉ pli granda, ol inter la bona kaj la fuŝa prozo. Se la

komisiono, kies starigon mi ŝerce proponis en mia lasta prelego, ekzamenus ankaŭ la Esperantan traduk-poezion, ĝi devus stampi la vorton "nerekomendinda" sur multajn el niaj versaĵoj kaj retiri ilin el la cirkulado, ĉar ili konfuzas la adaptiĝon de niaj komencantoj al la bona lingvo, kaj atencas ĝian progreson, helpante la plu-estadon de la duvizaĝa Esperanto en nia literaturo kaj en niaj lingvaj kutimoj.

Resume, la poezia tradukado estas eble la plej brila kaj, samtempe, la plej mistraktata parto de nia lingvo. Apud versioj eminentaj kiel la serio da kaloĉajaĵoj, aŭ kiel *La bapto de caro Vladimir,*[53] en traduko de Pumpr, *Kalevala,*[54] en traduko de Leppäkoski, *Otelo,*[55] en traduko de Rossetti, ni havas, kiel la alian flankon de la duvizaĝa Esperanto, nombron da versaj tradukoj tute senvaloran, kiel la jam menciitaj *Faŭsto,* en traduko de Barthelmess kaj la *Dia Komedio,* en traduko de Peterlongo. Kaj pensu, ke Barthelmess tradukis sian *Faŭsto,* en la sama jaro, kiam Kalocsay sian *Johano la Brava!*

En la jam menciita artikolo de Auld, *La internacia lingvo kiel belarta tradukilo,* la aŭtoro faras surprizan aserton: "*Tamen Esperanto ne estas, kaj ankoraŭ dum jarcentoj ne povos esti, tiel rigida kiel la naciaj lingvoj*". Kaj tuj poste li laŭdas la sistemon de afiksoj kaj la vortokunmetadon kiel faktorojn de flekseblo kaj elasto.

Ĝuste la malo okazas. La naciaj lingvoj, pro la konstanta uzado kaj evoluo laŭlonge de jarcentoj, fariĝis mirinde suplaj instrumentoj. Aliflanke, unu el la ĉefaj zorgoj de Esperanta tradukisto (se li bone scias sian oficon) konsistas en tio, kiel imiti aŭ alproprigi al si la naturan suplon de la originalo kaj eviti, kiom eble, la konstruitecon kaj artefaritecon generatajn de la vorto-kreaj mekanismoj de Esperanto. Kial oni parolas tiel ofte en la Esperantaj recenzoj pri la *flua,* aŭ ne flua, stilo de originaloj kaj tradukoj, se ne tial, ke sur nian lingvon pezas la ŝarĝo de la menciitaj vortokreaj mekanismoj? Neniam oni mencias en la recenzoj pri naciaj verkoj ilian pli malpli grandan fluecon, ĉar la naciaj lingvoj *nature* fluas, dum Esperanto facile rigidiĝas en la korseto de la kunmetado kaj de la afiksa sistemo.

La frazon de Auld mi modifus jene: "*Esperanto ne estos, kaj ankoraŭ dum longa tempo ne povos esti, tiel supla kiel la naciaj lingvoj.*"

Ĉar la lingvo mem povas akiri tian suplon sen rompo de siaj strukturoj kaj de siaj Fundamentaj principoj, al aŭtoroj kaj tradukistoj Esperantaj rekte koncernas la taskon, kaj la responson, konscie kaj metode riĉigi Esperanton per naturalismaj elementoj kaj rimedoj, por ke ĝi povu akceli sian ritmon de progreso kaj proksimiĝi al la grado de alta suplo propra al la naciaj lingvoj.

Kaj nun, estimataj amikoj, mi devas trakti gravan aferon rilatan al nia temo de la traduk-arto. Mi aludas al la naciaj-Esperantaj, kaj Esperantaj-naciaj vortaroj, iasence produktoj de la traduk-arto kaj, samtempe, ĝiaj helpiloj.

La kvalita nivelo de la pliparto de la naciaj-Esperantaj vortaroj estas terura. La plej senbrida skemeco pompas en ili, kio ne malmulte kontribuis, kaj kontribuas, al la alkroĉiĝo de la lingvo al certaj nocioj kaj konceptoj. La kompatinda verkemulo, kiu fidas je tiaj vortaroj por la tradukado de beletra peco en Esperanton, ŝajne ne komprenas, ke ilin, en ties pliparto, kompilis homoj, kies kono pri lingvistiko kaj leksikologio estis efektive nula. Ĝis la apero, en 1957, de la bonega *Granda Vortaro Esperanta-Franca*,[56] mankis en nia lingvo ampleksaj kaj fidindaj terminologioj. Post ĝi venas, imitante ĝin, la *Esperanta-bulgara*[57] de Atanasov kaj Simeonov, la *Esperanta-hungara*,[58] de Pechan, la *Esperanta-rusa*,[59] de Bokarev, la *Esperanta-angla*,[60] de Butler... Sed nia ĉefa neceso, de la traduka vidpunkto, kuŝas, ne tiel en la Esperantaj-naciaj vortaroj, kiel en la naciaj-Esperantaj. Kio ĝis nun eldoniĝis ĉi-rilate ne kontentigas la minimuman bezonon, se escepti, eble, la vortaron japanan-Esperantan de Jošicugu Okatomo,[61] publikigitan en 1935. La impona leksikologia riĉo de la lingvoj naciaj, kun siaj parolturnoj, frazeologio, kliŝoj, sinonimoj, antonimoj, homonimoj ktp havas nur lamajn kaj palajn ekvivalentojn en la naciaj-Esperantaj vortaroj, kie, krome, apenaŭ troveblas la traduko de idiotismoj

kaj de konstantiĝintaj vorto-konstruoj.

Sperta esperantisto povus scii, laŭ la stilo kaj la kvalito de traduko, ĉu ĝi venas de tradukisto uzinta por sia tasko nacian-Esperantan vortaron, aŭ la Plenan Ilustritan.

Urĝas do (tiom da aferoj urĝas en nia Movado!) la eldono de ampleksaj naciaj-Esperantaj vortaroj laŭ la stilo de PIV, se ni deziras, ne nur, ke niaj aŭtoroj verku en lingvo pli fleksebla kaj korekta, sed ankaŭ, ke la ordinaraj esperantistoj havu la eblon gvidi sin per normotrudaj kaj unuecaj vortaroj.

Sed la eldonon de tiaj vortaroj devus kunordigi supera lingva aŭtoritato (eble la Akademio de la Lingvo) por eviti la enŝoviĝon de strangaj nocioj kaj por decidi ilian komunan vortoprovizon. Ĉar okazas nuntempe, ke la uzanto, por ekzemplo de la Esperanta-pola vortaro de Michalski[62] skribas pri *abaĵuro, optima, pesima, antika, banduro, bandio, ciki, ĉamoto, konferi, koordini, lidero,* ktp, kiuj aperas eĉ ne en PIV. Kaj en la angla-Esperanta de Butler troviĝas, interalie, *ekspekti, dublo* (dubelo en PIV) kaj ne malmultaj radikoj kun novaj sencoj: *fomenti,* apliki varman kuracilon, kaj, krome, stimuli; *detekti,* pruvi la ĉeeston de elektraj ondoj kaj, krome, malkovri, eltrovi. La ekzemplojn oni povus multigi rilate al ĉi tiuj kaj al la ceteraj vortaroj, kaj, kvankam principe konvenas tia leksika kaj semantika riĉiĝo, trudiĝas la neceso, ke la lingvo estu unuece uzata en la vortaroj kaj ekster la vortaroj. Ekzistas kelkaj terminoj, kiuj ne trovas sian definitivan lokon en la vortaroj: *domini,* por ekzemplo, sidas en la suplemento de la Plena, en la franca de Waringhien, en la pola, bulgara, angla, ktp, sed oni ne scias kial, mankas en la Plena Ilustrita.

Lige kun la ĝeneralaj vortaroj Esperantaj-naciaj kaj naciaj-Esperantaj, menciindas la plorinda stato de nia faka terminologio. Multaj centoj da branĉoj de la scienco kaj la tekniko atendas ankoraŭ sian respektivan terminaron Esperantan. Kiam oni asertas en *Esperanto en Perspektivo*, ke nia lingvo posedas 127 fakterminarojn, tio egalas groteskan deformon de la vero, ĉar la pliparto el tiaj terminaroj traktas

nur etan, supraĵan parton de la respektivaj sciencoj, eldoniĝis antaŭ longe, multaj estas elĉerpitaj aŭ nehaveblaj kaj fakte havas nenian praktikan valoron. Eĉ se vere ekzistus 127 modernaj, kompletaj, ĝisdatigitaj terminaroj, kion signifus tia nombro antaŭ la nekalkuleblaj fakoj sciencaj kaj teknikaj, kies vortotrezoroj kapturne kreskas ĉiutage? Se ni memoras, ke Eichholz senlace klopodas jam de pluraj jaroj por traduki en Esperanton la terminojn, en granda nombro ĝeneralajn kaj komun-uzajn, de la bildovortaro Duden, kaj ke li pene progresas, eĉ helpate de kompetenta skipo internacia, ĉar ili ĉiupaŝe devas krei novajn esprimojn, ni povas fari al ni ideon pri la preskaŭ senespera paŭpereco de nia lingvo.

Imagu do la situacion de la Esperanta tradukisto. Sen bonaj vortaroj naciaj-Esperantaj, sen frazeologiaj kompiloj, krom la *Proverbaro* de Zamenhof kaj laste la *Domfabriko*[63] de A. Csiszár kaj Kálmán Kalocsay, sen fakterminaroj modernaj kaj fidindaj, se escepti la modele kompilitan *Internacia Komerca Ekonomika Vortaro,*[64] redaktitan de Munniksma kaj 24 kunlaborantoj, kaj, fakte, kun la sola helpo de la *Plena Ilustrita Vortaro*, la tradukisto Esperanta vidas sin antaŭ sia tasko kun sento de frustracio kaj senpovo. Kaj se li ne estus konvinkita pri la mirindaj potencialoj kaj latentoj de nia lingvo, se li ne firme kredus ke Esperanto, dank' al sia strukturo, havas la kapablon senlime disvolviĝi, li forĵetus de si la plumon kaj metus finon al sia sendanka laboro.

Kiam sur la praktika tereno oni proprasperte konstatas la limigojn de la lingvo, plia motivo de deprimo estas la ĉiel-klamaj protestoj de multaj esperantistoj – ekde "kiel-vi-fartuloj" kaj eternaj komencantoj ĝis solidaj akademianoj – kiuj reagas kvazaŭ antaŭ perfido, kiam oni parolas al ili pri la urĝa neceso akceli la paŝon de riĉigo de Esperanto. Ili ne komprenas, ke lingvo, kiu malgraŭ sia esence enorma valoro, ne povas aplikiĝi adekvate kaj nature al la plej diversaj kampoj de la homa agado, estas kondamnita al morto en pli malpli longa tempo. Ili ne komprenas, ke la aglutineco ne taŭgas kiel universala vortokrea rimedo en nia kompleksa socio teknika, kaj ke la vortokunmetado kaj la siste-

mo de afiksoj ankilozas la lingvon kaj subpremas ties viv-instinkton. Sed, pro speciala ironio, ĉi tiuj samaj personoj ĝenerale ŝatas kampanjojn por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn, en la sporton, en la organizajojn de la Unuiĝintaj Nacioj, en nur Dio scias kiom da institucioj, kie necesas riĉa kaj nuancita terminologio, kian Esperanto ne povas provizi en la nuna tempo.

Bedaŭrinde ni troviĝas ankoraŭ en la periodo de Basic Esperanto, kaj, kvankam jam konturiĝas la profilo de potenca, bela lingvo, oni devas plu iri longan tempon sur la vojo de la naturalismo kaj samtempe elteni pacience la protestan kriadon de esperantistoj, kiuj deziras la lingvon anemia kaj primitiva.

Nu, kiel resumo de niaj ĝisnunaj prelegoj, elstaras la jenaj faktoj, preskaŭ cent jarojn post la kreo de nia lingvo:

1) Esperanto ankoraŭ ne akiris unuecan fizionomion. Ĝi plu montras la dualismon de skemecaj kaj naturalismaj formoj.

2) Esperanto, malgraŭ siaj grandaj progresoj lingvaj en la lastaj jardekoj, troviĝas en la komenco de sia evoluo kaj oni ne povas proklami do, ke ĝi kapablas, krom en tre malmultaj kazoj, sukcese konkuri kun la naciaj lingvoj.

3) Esperanto suferas speciale gravan anemion en la kampoj de la tekniko kaj la scienco, kaj same en la familiara terminologio, do en gravegaj, esencaj parceloj de nia moderna vivo. En tiaj fakoj la lingvo, originale aŭ traduke, estas preskaŭ neaplikebla.

4) Esperanto ne posedas, en la naciaj lingvoj, krom kelkaj esceptoj, bonajn vortarojn, nek bonajn lernolibrojn, kio kontribuas la formiĝon de malbonaj esperantistoj.

5) Esperanto, kiel traduka lingvo proza kaj poezia tro ofte legiĝas tede plata kaj artefarita, kaj tro ofte devas pasi tra mensa mekanismo de dećifrado en la leganto, anstataŭ trafi lian komprenon tuje kaj senpere.

Sed kiel dirite, ekzistas solvo al tiaj mankoj. Tion ni traktos en la venonta prelego.

V.

ARKAISMOJ KAJ NEOLOGISMOJ KIEL HELPILOJ DE TRADUKADO

Estas tiel grava la demando pri neologismoj en Esperanto, ne nur koncerne la specifan laboron de la tradukisto, sed koncerne la tutan fizionomion de la lingvo, ke ni devas dediĉi al ĝi, preskaŭ ekskluzive, ĉi tiun prelegon.

Jam de la komenco de la lingvo, la unuaj akraj diskutoj, eĉ disputoj, inter esperantistoj, okazis pro la neologisma batalo, kiu daŭras ankoraŭ kun periodoj de akriĝo kaj etapoj de relativa trankvilo.

La neologisma batalo fariĝis populara sur ĉiuj niveloj de la Esperanta mondo, kaj fakte ĉiuj esperantistoj partianiĝis al la neologismofobio aŭ al la neologismemo. Temis pri ŝajne simpla problemo: aŭ defendi lingvon, kies vorto-generan dinamikon oni profitu ĝismaksimume, tiel evitante la enkondukon de novaj terminoj; aŭ preferi lingvon, kies ĉefa motoro de riĉiĝo moviĝu per la freŝa energio de la neologismoj.

Sed, vere, la problemo estas pli kompleksa: temas, se tiel diri, pri ŝanĝo de lingva filozofio. Dum la malamikoj de la neologismoj laŭdis la skemecon de la lingvo kaj ties fabelan vorto-krean kapablon, kiu laŭ iliaj aplombaj asertoj superas facile la riĉon de la naciaj lingvoj, la amikoj de la neologismoj – preskaŭ ĉiuokaze homoj, kiuj serioze manipulis la lingvon en la provaj kampoj de la literaturo kaj de la scienco – trovis, en la troa alligiteco al la sinteza Esperanto, tre gravan danĝeron de ŝtoniĝo kaj paŭpereco.

Tion klare vidis Zamenhof mem. En ege interesa artikolo, ne sufiĉe konata, li esprimas kun preskaŭ konsterna sincero kion li fakte intencis per la afiksa sistemo kaj, implicite, per sia vorto-krea aglutineco. Zamenhof verkis la artikolon por la periodaĵo *"La Revuo"*, je nekonata dato, sed ĝia direktoro, Bourlet, opiniis ĝin 'danĝera' kaj ne enpresis ĝin. La kreinto de Esperanto turniĝis en suspektindan personon por siaj plej proksimaj kunlaborantoj! Sed io tia preskaŭ ĉiufoje okazas

inter la diversaj mesioj kaj ties apostoloj.

Nu, laŭ komento de Waringhien en lia *"Leteroj de L.-L. Zamenhof"*, la originalo de la artikolo perdiĝis, sed C. Aymonier faris kopion el ĝiaj ĉefaj partoj. Waringhien publikigis ĝin en *"Lingvo Libro"*, 1938, n-ro 1, kaj Aymonier ĝin republikigis en *Franca Esperantisto*[65] (1945, n-ro 70-71). Jen fragmento de ĉi tiu eksterordinara dokumento:

"Mi memoras, ke en la unua tempo, mi kun speciala pasio okupadis min per serĉado de diversaj "reciprokaj rilatoj" inter la vortoj, kaj ĉiun trovitan rilaton mi fiksis per ia afikso. Ekzistis ekz-e afiksoj por "provizi per io", "proviziĝi per io", "abunda je io", "akiri (aŭ atingi) per io", "fari ĝissate", "fari karakterizan agon per io", "fari ion reciproke", "fari koncerne ion", "posedanto (mastro) de io" ktp. Ekzistis ambaŭ participaj sufiksoj por la kondicionalo kaj la imperativo; la sufiksoj "ebl" kaj "em" havis duoblan formon, aktivan kaj pasivan; ekzistis ne sole sufiksoj por la monatoj kaj semajnaj tagoj, sed eĉ speciala formo por esprimi la rilaton inter "doni" kaj "preni", "vendi" kaj "aĉeti", "instrui" kaj "lerni" ktp.... Poste venis periodo de reago. Konsciante, kiel terure malfacila estus la propagando en la unuaj jaroj, kaj konsciante, ke rompi la unuan glacion mi povus nur en tia okazo, se mi prezentus al la mondo ion eksterordinare facilan, mi komencis per ĉiuj fortoj elĵetadi ĉiun "balaston", t.e. ĉiujn vortojn kaj formojn, kiuj por la unua komenco ne estis nepre necesaj, kaj celadi al tio, ke la tuta lingvo, necesa por la unua tempo, trovu lokon sur malgranda folieto. Mi sciis, ke pliriĉigi la lingvon (per vojo de neologismoj) oni tre facile povos poste, kiam la mondo jam sufiĉe alkutimiĝis al la plej necesa fundamento".

Zamenhof intencis do, per sia skemeca lingvo "prezenti ion eksterordinare facilan" sed la pliriĉiĝon de Esperanto li konfidis al la neologismoj. Estas klare, ke Zamenhof vidis en la skemeco de Esperanto nur la bazan strukturon sed ne la ĉefan faktoron de riĉiĝo kaj evoluo, dum multaj el liaj plej intimaj kunlaborantoj, misgvidataj de la teoriaj ebloj de la afiksa sistemo kaj de la vortokunmetado rigardis la opinion

de Zamenhof preskaŭ hereza, kaj, kvankam oni lin flatis publike per la epiteto de "nia kara Majstro", li estis akre kritikata kaj riproĉata de siaj miopaj disĉiploj pro sia ŝajne ambigua pozicio.

Sed Zamenhof sciis, kiel scias ĉiuj seriozaj uzantoj de la lingvo post li, ke al Esperanto, kiel sinteza lingvo, mankas difiniteco, esprimoforto, nuancoj, kaj ke ĝi ne plene taŭgas kiel vehiklo de alta civilizo scienca kaj teknika. Kiam nocio aŭ ento ricevas difinon parafrazan aŭ priskriban, tiam la difino ne povas konkuri per konkreteco aŭ elvokiveco kun analiza difino de la sama nocio aŭ ento. En la afiksa sistemo de Esperanto, la sufiksoj *il* kaj *aĵ*, por ekzemplo, estas tro vast-signifaj en sia priskriba dinamiko tiel, ke multaj vortoj garnitaj per tiaj sufiksoj apenaŭ respondas al konkretaj konceptoj kaj oni devas lerni ilin kiel nurajn radik-vortojn. Kiel ni tradukus, por ekzemplo, *haltigilo, mordaĵo, fandaĵo* aŭ *araneaĵo*, se ties faktan sencon ni ne lernus en la vortaroj? Aliaj afiksoj kiel *an* aŭ *ist* ne estas unusencaj, kaj nur tial, ke ili ĝenerale aperas en la tiel nomataj internaciaj vortoj, ili ne kreas konfuzon al siaj legantoj aŭ skribantoj. *Ing* kaj *er* apenaŭ uziĝas en kelkaj dekoj da esprimoj, kaj *ad* akiris preskaŭ nur gramatikan kategorion por distingi verban substantivon disde nomo: *kronado, krono. Um* fakte estas balasto, kaj, kion diri pri *end*, eble la plej senlabora el niaj afiksoj?

Nu, Zamenhof, konsekvenca al sia principo riĉigi la lingvon pere de neologismoj, laboras intense en la transformo de sintezaj esprimoj al analizaj, kio kaŭzas, ke prof. Théophile Cart, en tiel frua dato kiel 1904, dissendis ian *"Malfermita letero al Dr. Zamenhof"* por protesti kontraŭ lia lanĉo de granda nombro da vortoj en la vortaroj Esperanta-germana, germana-Esperanta.

"Ĉu tiaj vortoj estas internaciaj, ĉu Esperanto, ĉu el sama lingvo, kiel tiuj de la Universala Vortaro, aŭ ĉu ili estas ia 'Idiom-neŭtrala volapukaĵo'?" – demandas sarkasme la granda inkvizitoro de la lingvo.

Sed kontraŭ la forta opozicio de la partianoj de unugrośa Esperanto, kiuj nur volas distri sin per la sama ludilo lingva, ĉiam supraĵa kaj elementa, kaj ankaŭ kontraŭ la opozicio de la partianoj de la skemeco

pro ĝiaj avantaĝoj (avantaĝoj pure teoriaj en konsiderinda parto), la aŭtoroj kaj poetoj kun lingva sento instinkte agaciĝis antaŭ la kodeca mekanismo de lingvo, (kiu tamen posedas la rimedon akiri freŝan vivon kaj buntan koloron) kaj sekvis la vojon signitan de d-ro Zamenhof por la riĉigo de nia vortaro kaj por la senbalastigo de la lingvo.

La turnopunkto de la neologisma batalo okazis en la epoko de Literatura Mondo, kiam la fenomeno Kalocsay enrompis en la stagnan marĉon de la tiama Esperanto kaj per sia suverena talento elpuŝis nian lingvon el la senperspektiva rutino kreita de miopa tradicio kaj de la reago kontraŭ la idista herezo. La batalo tiel furiozis tiam, ke la fama Baghy, iel sentante sin proparolanto de "la verda popolo", t.e. de la amaso sen gusto por la beletro, kaj sen ia konkreta ideo pri la urĝa neceso adekvatigi Esperanton al la literaturo kaj la scienco, lanĉis neracian atakon kontraŭ sia plum-kamarado Kalocsay en sia poemo "Ĉu Ido aŭ Poliglot'? Ne! Desperanto!" aperinta en la revuo de Literatura Mondo en januaro 1933:

La bruska burgo, orgojla fortreso:
La Fundament' *morozas sur la mont'*
kaj infre semas sur ruroj, novaloj
doktecon – Literatura Mond'.
Analoj diras, dum pluraj dekadoj
nur stagnis la poltrona oldular':
la baĉeloroj aprecas etoson
de streta pado, hastas al la skvar'...

La neologisma batalo ĉefe intensiĝis ĉirkaŭ la polemikaj malvortoj. Estas evidente, ke en la mal-vortoj kvazaŭ kondensiĝas la negativa aspekto de la sintezaj faktoroj de la lingvo. Krei antonimon per mencio de la ideo kontraŭa al antonimo mem oponas, ne nur al la elvokiveco, estetiko kaj natureco de lingvo, sed ankaŭ al ĉiaj psikologiaj elementoj de la homa naturo. Tion aludis jam prof. Waringhien en sia antaŭparolo al *Parnasa Gvidlibro:* "Por ke leganto sentu la malon de unu donita impreso ne sufiĉas kunmeti negacion kun la vortoj, kiuj ĝin

esprimas: ĉar oni tiel forigas la evitendan bildon, oni elvokas ĝin dum oni kredas ĝin forpeli".

La rebato de Faulhaber en lia libro *Ne tiel, sed tiel ĉi!*[66] absolute ne konvinkas. La nederlanda akademiano objetas, ke "observante nian Esperantan praktikadon, ni povas konstati, ke ne nur parkera lernado, sed praktika uzado ligas la vortojn al la objektoj aŭ iliaj imag-bildoj. Komence la vortoj estas al ni fremdaj, kaj ni tradukas ilin, sed ju pli ni aplikas la lingvon, des pli firmiĝas tiu interligo kaj des pli frue ni komprenas kaj uzas ilin. Fine ni ne plu tradukas, ĉar ili fariĝis nia posedaĵo. Verŝajne dank' al tiu kutimo oni ne sentis la por Waringhien kontraŭsencan elvokon de la mal-vortoj".

Tamen, Faulhaber ŝajnas pretervidi du gravajn faktorojn. Unue, malgraŭ la tre granda ekonomio generata de la sistemo de mal-vortoj, la tendenco de la lingvo, eble sub la impulso de profunda instinkto homa, rifuzas la sekan, ŝajne kontraŭnaturan, logikon de tia sistemo. Oni pensu, ke jam de la komenco mem, ĝia propra aŭtoro dediĉis sin krei, kontraŭ ĉiaj riproĉoj, paralelajn antonimojn sen la prefikso *mal*. Tamen, la lingvo neniam iris la inversan vojon, kvankam ĝi libere povus tion fari, kaj certe ĝi farus, se la sistemo de mal-vortoj estus tiel avantaĝa, kiel oni predikas. Neniam en Esperanto oni uzis *maltago* apud nokto, aŭ *malfini* apud komenci, aŭ *maljes* apud *ne*.

Due, super la persona alkutimiĝo senti la elvokivecon de ideo pere de unu aŭ alia vorto, ĉu simpla, ĉu kunmetita, ekzistas nombro da pli malpli objektivaj kriterioj por kompari la dezirindecon de unu formo aŭ de alia. Estas nedubeble, ke al dana patrino, ŝia dana lingvo estas la plej dolĉa kaj harmonia de la mondo, kiam ŝi parolas al sia bebo. Ŝia lingvo estas vehiklo de tre forta afekcia ŝarĝo kaj subjektive ĝi estas nekompareble bela. Sed se oni sobre komparas, por ekzemplo, la danan kun la itala, laŭ fonetikaj, muzikaj, harmoniaj kriterioj, tiam certe la itala superas la danan ĉi-rilate.

Same okazas en Esperanto kun la mal-vortoj. Eĉ se persone oni sentus ilin plene elvokivaj, la antonimoj sen *mal* estas laŭ objektivaj kri-

terioj pli rekte elvokivaj, pli vivaj, pli naturaj. Nenio donas al Esperanto tiel monotonan kaj kodecan aspekton kiel akumulo de mal-vortoj en paragrafo, kaj estas neeble krei per ili ian estetikan vibron aŭ vive speguli ian poezian emocion. *La malforta maljunulino malrapide malproksimiĝas per mallongaj paŝoj...* Ĉu la kriterio de vortoŝparo devus esti blinde obeata ĝis la ekstremo konsideri tian frazon kiel kulminon de fleksebla kaj belsona Esperanto? Sed feliĉe la natura evoluo de la lingvo iom post iom arkaikigas tiujn "propagandajn" vortojn. En sia *Lingvo kaj Vivo,*[67] Waringhien citas la statistikojn de ofteco de D-ro Manders, kaj li notas, ke en la *Fundamenta Krestomatio* oni renkontas meznombre po unu mal-vorton inter 64 vortoj; en la (pli posta je almenaŭ 10 jaroj) *La Rabeno de Bañaraĥ,*[68] po unu inter 50; en la *Teatra Korbo,*[69] eldonita en 1924, po unu inter 116, kaj en *Preter la Vivo,*[70] eldonita en 1923, po unu inter 196, kio estas des pli rimarkinda, se konsideri, ke Baghy, kiel ni jam vidis, malamikis al la neologismoj.

En la nuna tempo, la pliparto de la elstaraj Esperantaj aŭtoroj kaj aŭtoritatoj same iras la vojon de la naturalismo kaj la neologismo. Ekzistas, kompreneble, esceptoj, ĉefe inter lingvistoj kaj teoriuloj, kies kontakto kun Esperanto preskaŭ limiĝas al analizoj de ĝiaj strukturoj kaj al ĝiaj rilatoj kun la socia medio. Tiel, por ekzemplo, la akademiano Werner Bormann diras en sia libro *Bona Ŝanco,*[71] paĝo 151:

"Se Kalocsay en sia nova traduko de *Reĝo Lear* ne plu uzas mal-vortojn li nur kunmarŝas en la ĝenerala interlingvistika evoluo de skemeco al naturalismo".

Jam en ĉi tiuj komencaj linioj, d-ro Bormann eraras. Kiam li diras, ke Kalocsay ne uzas mal-vortojn en *Reĝo Lear*, tio simple signifas, ke li ne legis lian tradukon, ĉar jam en la unuaj kvar paĝoj li uzas almenaŭ 4 tiajn vortojn: *malamikino, malfeliĉulino, malpli* kaj *malsufiĉi.* Kaj kiam li asertas, ke Kalocsay iras en la *ĝenerala interlingvistika evoluo* de skemeco al naturalismo, li devus ŝanĝi tion al *ĝenerala lingva evoluo,* ĉar, kiel sciate, ju pli primitiva estas lingvo, des pli skemeca montriĝas ĝia strukturo.

Nu, Bormann daŭrigas: "... Por tio parolas la beleco kaj la ĝuo pro varieco. La lingvistoj tiel bonvenigas tian evoluon [Tamen la lingvisto d-ro Szerdahelyi ne opinias same, se juĝi lian oponon al la neologismoj]. Sed la sociologoj devas averti pro la kresko de la lernotaĵo. La internacia lingvo iam poste ja ne nur servos al aŭropanoj al kiuj la naturalismo ĝenerale ne estas tre ĝena. Sed ĝin uzu homoj de ĉiuj gepatraj lingvoj. Ĝi ne nur estu pasiva sciaĵo, sed ĝin aktive regu la homoj. Tiukaze ĝi prefere estu pli skemeca kiel Esperanto. Tial ni devas, laŭ mia opinio, esti tre rezistemaj kontraŭ tiu evoluo. Ni ne senpripense fordonu gravan avantaĝon".

Bormann asertas iom arbitre. Se, kiel li diras, kaj li diras prave, ekzistas ĝenerala evoluo de skemeco al naturalismo, tio ŝuldiĝas, finfine, al socia fenomeno, kaj se la aŭtoroj iras en la fluo de tia evoluo, oni pensu, ke ankaŭ ili iel respegulas, kaj samtempe interpretas, la socian medion, kie ili vivas. La kresko de la lernotaĵo – alia socia fenomeno – estas absolute neevitebla en ĉiuj lingvoj: escepti Esperanton estus la plej kontraŭsocia movo imagebla. Same kiel en la naciaj lingvoj kunvivas komunuza terminaro por la amasoj, kaj fakvortaroj por aŭtoroj kaj sciencaj specialistoj, tiel same devas okazi en Esperanto, se oni volas respekti la normalan disvolviĝon de la lingvo.

Ekzistas ĝenerala konsento, eĉ inter la plej konservativaj esperantistoj, ke la teknikaj terminoj devas esti toleritaj. "Klopodi bari la eniron en la komunan lingvon de tiuj vortoj kaj anstataŭigi ilin per vortoj priskribaj estas malracie, eĉ neeble", diras Faulhaber en sia menciita libro. En tio li pravas. Sed pretendi fermi la pordon al la postuloj de la literaturo, kiu iel estas la krea fonto de la komunuza lingvo, ŝajnas eĉ pli malracie, ĉar tia praktiko farus eĉ pli intensa la duvizaĝecon de Esperanto, kiu havus unuflanke naturalisman leksikonon sciencan kaj aliflanke skemecan vortaron ĝeneralan.

Eble kelkaj el miaj aŭskultantoj, kiuj legas en Esperanto sen zorgi pri problemoj de strukturoj aŭ stiloj, dezirus scii, per praktikaj ekzemploj, kion mi volas diri, kiam mi parolas pri la duvizaĝeco de Esperanto.

Nu, tian taskon mi cedas al nia eminenta kaj mistera poeto Maŭra, kiu nesupereble klarigas la diferencon per du poemoj de sia juvela libro *Duonvoĉe.*[72] Jen, unue ĉarma modelo de naturalisma, analiza Esperanto:

Al unu poeto *(Proverbaro 1154)*

Vi vivos ĉiam juna, kaj ĉiam danka rondo
vian cezaran frunton kronos per laŭra frondo,
ĉar el la griza gruzo de l' ĉiutagaj vortoj
vi sciis la unua elsorĉi diamantojn,
sonigi nian lingvon per novaj rim-akordoj
kaj al la vers' instrui ne jam aŭditajn skandojn.
Vi, kiu suverenas de l' Muzoj favorate,
sed super emocioj ĉiam memoris arti,
ne timu la futuron fiere alrigardi:
vidu, el la glorlando etendas manon frate
Dante, Ronsardo, Spencer, Vrchlický, Vörösmarty!

Post ĉi tiu bela omaĝo al nia karmemora Kalocsay, jen la aspekto de la alia flanko de la vizaĝo de Esperanto:

Al unu etopo *(Proverbaro 813)*

Malsen respekto mi nun malrektigas min malpost la ardo,
kiu mem malestingiĝis en via malina maldorso,
ĉar banalajojn kulturi vin gvidis senmanke la gusto,
kanti pri la dekcentitoj de nia malruĝa stangtolo,
versojn la plej unutone gurditajn fidele elekti,
kaj, en okazo de festo, por inde rafini la formon,
rime aranĝi "doloro" kun "koro", "ĉiele" – "anĝele",
sen malmemori la riĉan sesopon "mi, vi, li, ŝi, ĝi, ni";
krome, se malpor la neologismoj vi maltro protestas,
kies malvivon ja devus malpuni salutoj centsalvaj!)
min malmensogos, ke vi maljunaĝon ne vidos, ĉar estas
kapo la via el kiuj fariĝas nek grizaj nek kalvaj!

Evidentas la troigo, por doni karikaturan efekton al la poemo. Tamen, jen alia montro de skemeca Esperanto, verkita kun la plej serioza intenco, ĉar ĝi pretendas esti traduko de soneto de Cervantes. La versio ŝuldiĝas al la inspiro de Julio Mangada, nia eminenta esperantisto simpatie citata de Carlevaro en *Esperanto en Perspektivo:*

Kvankam malsaĝaĵoj vin, ho Sinjoro!
tre freneze jam cerbumis, domaĝo!
ne riproĉos vin malinda malsaĝo
eĉ malnobla kun malbona humoro.

Ja juĝistoj, heroaĵoj kaj gloro
viaj estos; por justec' kaj kuraĝo,
malgraŭ bastonfrapoj al vi eĉ kaĝo,
kiujn donis fivirar' sen honoro.

Se de bela Dulcine' vin atencus
ammalfidelaĵo, nobla fianĉo!
kaj ŝi malestimus viajn ĉagrenojn,

jen: ŝin same malfeliĉ' rekompencus;
ĉar malsaĝa kuriero ja Sanĉo,
ŝi kruela, kaj vi havis detenojn.

Eble vi objetos, ke pri tia ekstravaganco kulpas, ne la skemeco de Esperanto, sed la nescio de la tradukinto. Jes, sed mi estas certa, ke se generalo Mangada estus uzinta pure naturalisman lingvon, li tradukus nek tiel nekompreneble, nek tiel absurde. En ĉi tiu eminenta fuŝo, kiel en multegaj aliaj fuŝoj ne tiel evidentaj, la fama afikso-sistemo kaj la vortokunmetado signife kunlaboris kun la manko de kapablo de la aŭtoroj.

Iel parencaj al la neologismoj estas la arkaismoj. Laŭ difino de la Plena Ilustrita Vortaro, "arkaismo" estas vorto aŭ esprimo ne plu uzata en la komuna lingvo. Ĉu ilin posedas Esperanto? Mi ne scias. Antaŭ kelkaj vortoj, kiel "inkursio" uzita nur unufoje en *Sinjoro Tadeo*, mi ne kuraĝus decidi, ĉu temas pri sensukcesaj neologismoj aŭ pri puraj arkaismoj.

En la naciaj lingvoj, la nunaj arkaismoj estis iam vortoj longe kaj vaste uzataj, kio ne okazas en nia Esperanto. Krome, nia lingvo estas ankoraŭ tro juna por postlasi vortojn kun historie ranca odoro, do multajn el la tiel nomataj arkaismoj mi katalogus sub la rubriko de 'gramatikaj aŭ semantikaj eraroj' aŭ de 'sensukcesaj neologismoj'. Konvenus, tamen, registri ilin en niajn vortarojn, eĉ se nur por sekvi la evoluon de la lingvo, kaj por ke la futuraj generacioj de esperantistoj sentu ĉe ili la specialan aromon, kiun ni ankoraŭ ne kapablas percepti, eble tial, ke ili ne sufiĉe maturiĝis.

Ĉu ni konsideru kiel arkaismojn uzeblajn por difinitaj literaturaj efektoj la formojn kaj esprimojn de la pra-esperantoj eksperimente provitaj de Zamenhof inter 1878 kaj 1887 kaj kompilitaj de Waringhien en ties *Lingvo kaj Vivo?* Fakte oni ofte citas en la ĝenerala lingvo la belan frazon: *(Kadó, kadó) jam temp' está* kun ĝia arkaisma nuanco, kaj eble oni povus elpingli nombron da similaj frazoj por spici per ili, en taŭgaj okazoj, nian formalan Esperanton.

Sed krei artan leksikonon de arkaismoj ŝajnas al mi bedaŭrinda tempoperdo. Ĉar la arkaismoj, en la naciaj lingvoj, apartenas al diversaj kronologiaj etapoj, t.e. ekzistas diversaj serioj da neologismoj. Por ekzemplo, en la hispana ni havas neologismojn el la komenca stadio de la lingvo, kiuj uziĝis ĉirkaŭ la jarcentoj 8-a kaj 10-a; poste, diversaj literaturaj etapoj en la jarcentoj 13-a, 14-a, 15-a kaj 16-a postlasis multe da epok-karakterizaj neologismoj.

Se oni kreus en Esperanto leksikonon de arkaismoj: al kiu epoko ili devus aparteni? Ĉu ni kreus arkaismojn aplikeblajn al ĉiuj pasintaj tempoj? Ĉu ni kreus, ne nur mezepokan Esperanton, sed ankaŭ rene-

sancan aŭ barokan?

Mi opinias, ke se ni ankoraŭ ne konkeris la nunon kaj la futuron, superfluas klopodi konkeri la paseon. Studado de arkaismoj povas esti agrabla okupo de Esperanta erudito, sed ili ne havas, por la lingvo, la esencan gravon de la neologismoj.

VI.

PRAKTIKAJ KONSILOJ KAJ FUTURO.

En sia bela kaj instrua eseo *La traduk-arto*, Waringhien donas tre bonajn regulojn al la tradukontoj. Unue, kompreni la tradukotaĵon, al kio li aldonas la jenan korolarion: antaŭ ol traduki tekston, havigu al vi fidindan eldonon de ĝi, se eble kun notoj kaj komentoj, kaj la necesajn laborilojn (gramatiko, filologia vortaro) kiuj ebligos al vi trovi la ĝustan sencon de la malfacilaj lokoj. Due, povoscii Esperanton, kun la korolario: neniam publikigu tradukon, eĉ deklinian, kiun vi ne kontroligis per klera alilingva esperantisto. Trie: traduki ne la vortojn, sed la sencon, kun la korolario: por elprovi viajn fortojn, traduku pecojn jam tradukitajn de famaj esperantistoj kaj komparu, detalon post detalo, vian laboron kun ilia verko: nur per imito akriĝas kvalito!

La konsiloj de Waringhien, kompreneble, estas sekvendaj, ĉar ili venas de majstro tradukanto en prozo kaj poezio. Sed al ili, kun mia karakteriza manko de modesto, mi kuraĝus aldoni la jenan: Se la tradukotaĵo aperis jam en aliaj naturaj lingvoj, kaj la tradukonto scipovas ankaŭ ilin, li havigu al si la koncernajn tradukojn.

Efektive, la atenta komparo de la originalo kun aliaj nacilingvaj versioj donas la senkomparan avantaĝon analizi ĉiun vorton, esprimon kaj frazon de la originalo tra la prismo de tri aŭ kvar diversaj interpretoj. Kaj tiel, okazas, ke, kio en la originalo ŝajnas netradukebla parolturno, tio trovas feliĉan – kaj esperantigeblan – solvon en unu aŭ alia el la naciaj tradukoj. Kio en la originalo povas ŝajni propra idiotismo, tion ofte konfirmas aŭ dementas la ceteraj tradukoj, depende de tio, ĉu simila idiotismo aperas ankaŭ en ili, aŭ ne; en la unua okazo

temas pri internacia idiotismo, do, eble enkondukinda ankaŭ en la Esperantan tradukon.

Ĉi-rilate mi devas konfesi, ke se por mia traduko de *Don Quijote* en Esperanton, mi ne estus helpinta min per franca kaj angla versioj de la verko, mia laboro fariĝus multe pli komplika kaj temporaba, kaj la fina rezulto vidiĝus ne tiel sukcesa. La franca kaj angla tradukoj de mi uzitaj kelkfoje klarigis al mi dubajn punktojn en la hispana originalo, kelkfoje sugestis la manieron redoni en Esperanton, plej fidele al la senco kaj intenco de la originalo, la esprimon pli ĝustan kaj sukan.

Sajnas, ke Kabe uzis ĉi tiun sistemon por siaj tradukaj laboroj, kaj mi estas certa, ke almenaŭ parto de la brilo de liaj versioj ŝuldiĝas al la kontribuo de alilingvaj tradukoj.

Tia komparo de la originalo kun ties diverslingvaj tradukoj tre utilas koncerne la sencan fidelecon kaj la redonon de aparte malfacilaj parolturnoj. Sed aliaj elementoj pure formalaj, apartenantaj al la stilistiko devas esti traktataj laŭ nur la originalo. Sekvi ankaŭ ĉi-rilate la ritmon aŭ kadencon de stilo de la aliaj nacilingvaj tradukoj estus erare, ĉar en bona Esperanta traduko devas reflektiĝi ne nur la atmosfero psikologia kaj idea de la originala verko, sed kiom estas eble en nia lingvo, ankaŭ ĝia fizika korpo kaj ties diversaj proporcioj kaj materialaj kvalitoj.

Bona tradukanto devas speciale atenti la feblajn punktojn de la Esperanta stilistiko por laŭeble ne peki per ili. Ni havas, por ekzemplo, la verbon *esti*. En niaj eŭropaj lingvoj ĝi uziĝas oftege, do la Esperanta tradukanto preskaŭ aŭtomate kopias ĝin en sia versio tiel ofte kiel ĝi aperas en la originalo. Kia pli granda fideleco? Nu, nia tradukanto finas paĝon de sia versio; li sentas sin speciale fiera pri tia paĝo, ĉar ĉion li transdonis fidele laŭ la formo kaj la senco. Sed li relegas la paĝon kaj tiam li rimarkas, ke io ne iras en ordo, ke iel lia tradukita paĝo havas pezon kaj monotonecon, kiaj ne troviĝas en la originalo. Kio do okazas?

Se nia tradukanto posedas sufiĉan ritmo-senton, li baldaŭ trovos, ke nur la oftega ripeto de la verbo *esti* fuŝas la fluon de la paĝo. Sed,

kial ne en la naciaj lingvoj? Simple tial, ke, ĝuste pro ĝia ofteco, la uzo de multaj generacioj reduktis al minimumo la korespondan *esti* por fari ĝin pli leĝera en la konversacio, kaj eble ankaŭ por obei la instinktan emon de la popoloj nekonscie strebi al lingva estetiko. Ĝenerale, en la naciaj lingvoj, *esti* havas nur unu silabon aŭ akiras diversajn formojn dank' al la fleksio, do ĝi apenaŭ sentiĝas en la tekstoj pro sia leĝero kaj vario; kontraŭe, en Esperanto, *esti* kun sia peza konstruo kaj sia sola formo por ĉiuj personoj promenas en la linioj kun la monotona kaj forta paŝado de elefanto kaj detruas ĉian eblan efekton de stilo.

Oni klopodu do, eviti laŭpove la uzon de *esti*. Ekzistas diversaj rimedoj: uzi anstataŭe aliajn sinonimojn: stari, sidi, kuŝi, troviĝi, stati, situi... ekzili la kompleksajn verboformojn kaj utiligi ilin nur en okazo de ekstrema neceso; rekte verbigi substantivojn kaj adjektivojn... Ne malofte la simpla ŝanĝo de *esti* al aliaj formoj donas al la teksto surprizan fluon kaj vivantecon.

Io simila okazas en Esperanto kun la rilativoj. La rilativo en la naciaj lingvoj, pro sia ofta utiligo, apenaŭ distingiĝas en la konversacio, preskaŭ perdiĝas kiel plia silabo de apuda vorto, estas eminente prononcebla. En Esperanto la rilativoj havas tro da pezo, se konsideri ilian konstantan uzon, ŝajnas stumbloblokoj en la normala iro de la vortoj, subitaj singultoj en flua oratoraĵo. Ĝuste la plej uzata rilativo, t.e. *kiu*, kun sia ofta ŝarĝo de pluralo kaj akuzativo kaj kun sia penetra vokalkombino, ne lasas sin ŝanĝi tiel facile kiel la verbo *esti*. Tamen la eltrovemo de la tradukanto povas iel redukti ĝian ĝenan ĉeeston per la transformo de rilativa propozicio en participa, per la anstataŭo, kiam eble, de *kiu(jn)* per *kia(jn)*... ne tre bela sed iom pli fonetike tolerebla ol *kiu(jn)*... Abundo de la formoj *kiu(jn)* kaj *estas-is-os* en Esperanta traduko aŭtomate rabas de ĝi grandan parton de ĝia beletra valoro kaj de ĝia afekcia forto.

Oni povus objeti al mi, same kiel Faulhaber objetis al Waringhien en la kazo de la mal-vortoj, ke ĉio estas afero de kutimo. Sed mi donus la saman respondon, nome, ke super la persona kutimiĝo ekzistas aliaj

pli objektivaj kriterioj: eŭfonio, ritmo, naturalismo, vivanteco... "Kiu kutimiĝis al bono, pli facile kutimiĝas al plej bono" – diras proverbo eble universala. Se oni reverkas unu el la multegaj paĝoj de nia literaturo plagataj de *kiu(jn)* kaj de *estas-is-os*, en alian paĝon sen tiaj stumblo-blokoj kaj sen tiaj peze monotonaj verboj, tiam la leganto aŭ la aŭskultanto, malgraŭ sia eventuala alkutimiĝo al la unuaj formoj, instinkte preferos la duajn, ĉar la lingvo reliefiĝas pli flua, viva kaj drasta.

Alia aspekto de nia Esperanta tradukarto estas, ke iuj naciaj lingvoj estas pli malfacile tradukeblaj, sekve, la problemoj, kies solvon devas entrepreni Esperanta tradukanto, varias laŭ la tipo de la elira lingvo. Por ekzemplo, por traduki poemon el lingvo karakterizata de mallongaj vortoj, kiel la angla, aŭ de vortoj longaj, kiel la francaj aŭ la itala, la tradukanto devas posedi specifajn, apartajn rimedojn. La angloj, por ekzemplo, devas atenti la kaptilojn de sia silab-avara lingvo, ĉefe kiam ili tradukas poemon; la hispanoj devas atenti la spiriton emfazan kaj retorikan de sia lingvo; la germanoj la pezon de siaj lingvaj strukturoj kun ties ofta vortokunmetado kaj kompleksaj verboformoj. Konvenus do la publikigo de lernolibroj kun analizoj de la diversaj nacilingvaj strukturoj kaj kun instruoj pri la plej trafa maniero traduki en Esperanton tion, kio plej distancigas la spiriton de la naciaj lingvoj disde la spirito de la lingvo internacia. Sendube tiaj lernolibroj servus kiel tempoŝpariloj en la formado de bonaj tradukistoj, kaj helpus starigi pli grandan koherecon en la uzo de bona Esperanto.

Kiel ajn oni versu el la diversaj lingvoj en Esperanton, oni ĉiam memoru, ke nia lingvo, pro sia aspiro fariĝi tutmonda interkomprenilo, devas esti, antaŭ ĉio, klara kaj elasta. Kaj en observo de tia principo ni devas labori. Se vi estas germano, kaj sub la influo de via nacia lingvo vi juĝas klara kaj elasta vian tradukon, ne kontentiĝu per tio: se eble, komparu vian tradukon kun aliaj versioj en lingvoj de alia struktura tipo, kaj povas esti, ke, el la komparo, montriĝos, ke via traduko povas gajni ankoraŭ pli da klaro kaj elasto; se vi estas hispano, kaj vian tradukon vi same juĝas klara kaj elasta, sekvu la saman procedon, kaj eble vi

konstatos, ke via versio povas eĉ multe pli boniĝi, se vi eliminas el ĝi la superfluan vorto-abundon kaj la balastan komplikon de la sintakso. Unuvorte, oni komparu, se eble, la propran tradukon kun alilingvaj versioj, kaj, se ne, oni submetu ĝin, laŭ la bona konsilo de Waringhien, al la revizio de kleraj esperantistoj de alitipaj lingvoj.

Iel ajn, nia unua versio ĉiam estas plibonigebla, tiamaniere, ke la bona tradukanto, antaŭ ol juĝi sian tradukon definitiva, eksperimentas per la sama paĝo kvar, kvin fojojn – ĉe la kazo de poemoj eĉ dek kvin, dudek fojojn, – antaŭ ol li sentas, ke la teksto fluas kaj ke la formo kaj la enhavo preskaŭ senmanke kunagordiĝas. Estas mirinde, ĝis kia grado nia lingvo povas fajniĝi kaj nete konturiĝi, kiam oni ĝin submetas al intensaj, sinsekvaj kribradoj.

Antaŭ la tradukanto leviĝas multfoje la demando pri "logiko", kio rekte rilatas kun la principo "verki klare". Kiam ni renkontas en originalo esprimon sukan aŭ parolturnon plenan de elvokiveco, tiam ni konstatas, ke ofte laŭlitera traduko ne eblas en Esperanto. Krei parencan parolturnon en nia lingvo elvokive kaj suke proksiman al la parolturno de la originalo konsistigas unu el la plej delikataj kaj malfacilaj taskoj de Esperanta tradukanto. Kaj se plene kontentiga redono ne eblas, kaj nia traduko vidiĝas pala kaj plata en frazo de alineo, ni klopodu almenaŭ doni pli da energio kaj reliefo al alia frazo de la sama alineo por, per la leĝo de kompensoj, iel ekvilibrigi la etoson de la tuto. Kompreneble, ne ĉiam oni povas uzi tian procedon, sed konvenas ĉiuokaze esplori la eblecon de ĝia apliko.

Sed ni ne pretendu konstante rigoran 'logikon' en nia traduka laboro. Oni pensu, ke tradukita teksto devas enteni ankaŭ ion, kion la leganto devas interpreti ne nur per sia logiko, sed ankaŭ per sia imago kaj fantazio. Oni pensu, kiom da nelogikaj – sed samtempe vivaj kaj sukaj – esprimoj troviĝas en la *Esperanta Proverbaro* aŭ en tiu trezoro de frazeologio, la *Domfabriko*, lasta verko de nia neforgesebla Kalocsay, por kompreni, ke *logika* estas ne ĉiam sinonimo de *klara*, sed ofte de *seka* kaj *seninteresa*, kaj ke la Esperantaj tradukantoj devas montri

pli da kuraĝo en la redono de diversaj stilfiguroj.

Sed doni konsilojn por la formiĝo de bona Esperanta tradukanto estas ĉiam akcesora flanko de kompleksa afero, ĉar en li kunfluas personaj kvalitoj, kiel pacienco kaj idealismo; denaskaj kapabloj, kiel literatura kaj lingva sentoj, kune kun sufiĉa bazo de ĝenerala kulturo. Se tiaj premisoj mankas, la akiro de praktika tekniko beletra ne donos tre pozitivan rezulton; se oni ilin posedas, la tradukarto iel aŭ alie apertos la pordon de siaj belaj sekretoj kaj de siaj nervomuelaj malfaciloj. Sed oni ne forgesu, ke eĉ la plej kapabla homo devas longe kaj intense labori, ĝis tiaj kapabloj kaj kvalitoj lernas interakordiĝi por la plenumo de komuna celo.

Kaj tamen, Esperanto plej bezonas tradukantojn, aŭ pli ĝuste, bezonus ilin, se iam nia lingvo estus agnoskita de la flanko de la registaroj kiel dua en tutmondaj rilatoj. Sur ilin falus la peza ŝarĝo traduki nekalkuleblan nombron da oficialaj dokumentoj, komunikaĵoj, informoj, apartenantaj al la diversaj densaj branĉoj de la administracio kaj de la privataj entreprenoj, kio igas nin pensi pri la eksterordinara gravo, ne nur aktuala kaj konkreta, sed ankaŭ potenciala, de nia tradukado.

Sed, ĉu ni rajtas pensi tiel optimisme pri la futuro? La aspekto de la nuno ne donas al ni motivon de optimismo. De kiam aperis *La infana raso,*[73] en 1956 kaj *Kiel akvo de l' rivero,* en 1963, niaj originalaj poezio kaj prozo de alta nivelo ĉesis ekzisti. Malaperis la revuoj literaturaj de la kategorio de *Literatura Mondo, La Nica Literatura Revuo,*[74] *Monda Kulturo*[75] kaj *Norda Prismo.*[76] La Esperanta gazetaro limiĝas preskaŭ ekskluzive al kelkaj bultenoj terure mispresitaj kaj pliparte fuŝe verkitaj. La Esperantaj kluboj fermiĝas pro manko de membroj aŭ vivas apatian, sektecan vivon, sen ia influo sur la ĉirkaŭa socia medio. Kelkaj el la profesiaj filologoj, kiuj venis en la kampon de nia lingvo, instruas ĝin sur universitata nivelo kaj samtempe atakas la fundamenton de ĝia gramatiko kaj de ĝiaj strukturoj. Famaj eldonejoj, kiel *Stafeto,* efektive ne plu funkcias.[77] La junularo, malgraŭ ke ĝi proklamas sin revolucia, ne kapablas vidi la profundan revolucian

faktoron imanentan en nia lingvo. Kio montris ioman vivon kaj pozitivan progreson, tio ricevis eksterman baton de la flanko de politikaj fanatikuloj kaj de ambiguaj hometoj. La eldona agado manifestiĝas ĉefe per kelkaj represoj de 'klasikaj' Esperantaĵoj kaj per la publikigo de tradukoj, kiuj rivelas nenion novan rilate al ilia traduka tekniko, kaj kies literatura rango ankaŭ ne elstaras. Ni faras al ni iluziojn kaj trompas nin mem, pensante, ke, se en nia lando bedaŭrinde la Movado stagnas kaj falas en la sensignifon, tamen ĝi progresas en aliaj landoj, preskaŭ ĉiam en la plej foraj kaj ekzotikaj: jes, sed en Jugoslavio... aŭ, jes, sed en Japanujo... tiel ni konsolas nin. La vero estas, ke ondo da laco kaj apatio balaas la Esperantan movadon ĉie en la mondo. Vere, neniam ĝi estis forta, tamen havis almenaŭ iluzion kaj entuziasmon kapablan transloki montojn...

Ne plu en nia tempo, sed ne mirinde. En mondo perdinta unue la fidon je la religiaj kredoj, poste la fidon je la sciencaj atingoj, poste la fidon je politikaj doktrinoj kaj fine la fidon je la esencaj valoroj de la etiko kaj la moralo, kian rolon povus ludi nia povra Esperanto, se, kvankam planita por entrepreni ege praktikan funkcion, ĝi bezonas la helpon de forta dozo da idealismo por povi antaŭenpuŝiĝi al la proklamita celo?

Tiel prezentiĝas la nuna situacio, aŭ, mi vidas ĝin tia. Sed la situacioj ŝanĝiĝas, estas provizoraj aspektoj de pli ampleksaj perspektivoj, kaj tial, mia pesimismo estas nur ŝajna. Efektive, mi fidas je la futuro, ĉar, se la mondo plu iros sur sia nuna vojo de materialismo kombinita kun pragmatismo, ĝi alvenos nepre al Esperanto por solvi, en la kampo lingva, la dilemon de materialismaj aspiroj, kiuj ne konkretiĝas nun pro manko de pragmatismaj decidoj. Aŭ se la mondo reagos kaj sekvos la vojon de la idealismo, ĝi same bonvenigos Esperanton ankaŭ pro la etikaj faktoroj de la lingvo entenataj en ĝia interna ideo.

Kun tia konvinko mi laboras. Kaj se miaj konkludoj estus eraraj? Nu, ĉio eblas. Sed mi ne povas kredi kaj ne kredi samtempe. Mi preferas lasi min gvidi de miaj konvinkoj, ĉu ĝustaj, ĉu eraraj. Ĉu ne la homoj

ĝenerale laboras kaj klopodas kun la ideo atingi post longaj jaroj ian situacion aŭ celon? Eble ni ĉiuj pensis pli ol unufoje: "Ĉu havas sencon ĉion, kion mi faras? Mi povas morti, aŭ mortiĝi, en la plej neatendita tago..." Tamen ni ne krucas la brakojn kaj sidas neniofare, pensante pri la probablo de natura morto aŭ de fatala akcidento, kiu vanigus niajn strebojn. Kontraŭe, ni iras antaŭen sur la vojo, ĉar, malgraŭ ĉio, ni fidas kaj esperas. Same malgraŭ ĉio mi havas fidon kaj esperon al nia lingvo kaj al ĝia filozofio, eĉ se nuntempe ĝi trapasas severan krizon.

Kun tia fido kaj espero, kaj kun la okuloj turnitaj al la futuro, mi ŝatas pensi de tempo al tempo pri kio konvenus fari en la kampo de la Esperanta tradukado. Jen kelkaj el miaj ideoj:

1) Kompili ampleksajn frazeologiojn naciajn-Esperantajn, laŭ la modelo de la hungara "*Domfabriko*";

2) Kompili liston de naciaj verkoj tradukendaj en Esperanton kaj, laŭ la listo, efektivigi metode la tradukan taskon, kun plenaj garantioj rilate al la kompetento de la tradukistoj kaj al la fina rezulto de iliaj versioj. La listojn farus en ĉiu lando respektivaj komitatoj de eruditoj;

3) Iel kontroli la kvaliton de ĉiuj tradukoj, malkonsili la eldonon de la fuŝaj kaj publike deklari ilin "senvaloraj", se tamen ili eldoniĝos;

4) Krei centran instituton internacian de tradukistoj, kie ili povus persone trakti ĉian demandon pri la specifaj problemoj de la Esperanta tradukado;

5) Prepari ne nur beletrajn tradukistojn, sed ankaŭ fakajn, kaj starigi ian kunlaboradon inter la beletraj kaj la fakaj por la entrepreno de specialaj tradukaj taskoj;

6) Eldoni plur-voluman, enciklopedian vortaron, kune kun ampleksaj fakterminaroj.

Mi tute konscias, ke nuntempe, pro manko de ekonomiaj rimedoj kaj de sufiĉa nombro da kompetentuloj, oni povas efektivigi eĉ ne unu el la ses proponoj. Tamen tio estus minimuma programo, ĉar la tradukado, pro la motivoj supre diritaj, meritas apartan atenton de la Esperanta mondo. Sed kiam oni pensas, kiom da gigantaj, kaj tamen belaj,

taskoj atendas nin, oni ne povas eviti senton de frustracio, observante en kian staton de steriliga klanismo falis nia Movado. Ni konsumas niajn anemiajn fortojn, batalante inter ni antaŭ la amuza aŭ malestima rigardo de la ekstera mondo. "Jen, vidu", ĝi rikanas, "la esperantistoj volas starigi intergentan fratecon per sia lingvo, kaj tamen ĉiam disputas inter si kaj eĉ ne interkonsentas pri la meritoj aŭ malmeritoj de sia paca instrumento, t.e. de Esperanto mem". Kaj la mondo levetas la ŝultrojn kaj plu iras sen atenti nin.

Sed, eĉ se paradokse, ankaŭ tia situacio provokas senton de optimismo, ĉar, se per nia absurda konduto kaj niaj senfinaj kvereloj ni ne sukcesis definitive enterigi la lingvon, tio signifas, ke Esperanto havas tiel eksterordinaran vivopovon, ke ĝi povas sukcese trapasi ĉiajn ceterajn provojn. Esperanto povis eltiri sin el la malfacilaj cirkonstancoj de la unuaj jaroj de sia vivo, kiam ĉiuj arogis al si la rajton fari modifojn al lingvo ankoraŭ sen tradicio kaj stabileco; poste ĝi supervivis la gravegan danĝeron de la Ido-skismo, venkis la konkurencon de aliaj lingvoprojektoj, emerĝis febla, sed ne spirmanka el la du mondaj militoj, eltenis la teroron kaj la torturon de senkompataj reĝimoj diktaturaj, rezistas la manovrojn ĝin politikigi...

Nu, la mondo, kiu montras al ni sian indiferenton aŭ malestimon, nepre renkontos nin denove, kiam ĝi pretos solvi siajn sociajn kontraŭdirojn, kaj tiam ĝi komprenos, ke la batalema tribo de la esperantistoj, iam tiel malmulte inda je respekto aŭ konsidero, tamen havis la klarvidon klopodi por io certe originala kaj unika en la historio de la homaro: por lingvo, kiu estas samtempe idealo.

Kaj nun, mi devas jam meti la finan punkton al mia serio da prelegoj. Pardonu, se pro la nereduktebla tendenco de mia spirito observi nenian metodon de intelekta disciplino, mi kelkfoje flankiĝis la temon traduk-artan kaj disvagis en aliaj aspektoj de la Esperanta problemaro. Dankon, ke vi aŭskultis kun ĝentila pacienco miajn opiniojn, eĉ se multaj el ili ne plaĉis al vi, aŭ iel ŝokis vian propran ideon pri la hierarkio de valoroj de la Esperantaj aŭtoroj kaj libroj.

NOTOJ

1) G. Waringhien: La tradukarto. En: G.W.: *Eseoj I. Beletro.* La Laguna 1956, p. 48-67.
2) *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto.* Paris 1970. (Repr. 1977.)
3) L.L. Zamenhof: *Proverbaro Esperanta.* Paris 1910. 2-a eld. 1925. La Laguna 1961. 2-a eld. 1974.
4) E. Ockey: *Leksikono de oficialaj vortoj.* Banstead 1971.
5) W. Auld: La Internacia Lingvo kiel belarta tradukilo. En: *Memorlibro eldonita okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de L.L. Zamenhof.* Londono 1960, p. 54-67. Ankaŭ en: W.A.: *Pri lingvo kaj aliaj artoj.* Antverpeno, La Laguna 1978, p. 95-157.
6) R. Schwartz:... *kun siaspeca spico!* La Laguna 1971.
7) W. Auld: *La infana raso.* La Laguna 1956. 2-a eld. 1968.
8) S. Petöfi: *Johano la brava.* Trad. K. Kalocsay. Budapest 1923. 2-a eld. 1948. 3-a eld. 1970 (en: *Libero kaj amo*).
9) B. Apitz: *Nuda inter lupoj.* Trad. K. Schulze. Leipzig 1974.
10) S. Engholm: *Homoj sur la tero.* Budapest 1932. 2-a eld. La Laguna 1963.
11) S. Lagerlöf: *Gösta Berling.* Stockholm 1934.
12) M. de Cervantes Saavedra: *La malprudenta scivolulo.* Valencia 1955.
13) W.A. Verloren van Themaat: Pri la traduka kaj originala literaturo. En: *Norda Prismo* 1974: 1, p. 18-20.
14) P. Baroja: *La arbo de la sciado.* La Laguna 1973.
15) R. Rossetti, F. Szilágyi (red.): *33 rakontoj. La esperanta novelarto.* La Laguna 1964.
16) E. Privat: *Vivo de Zamenhof.* London 1920. 6-a eld. Orelia (Aŭstralio) 1977.
17) J. Forge: *Abismoj.* Leipzig 1923. (Repr. Helsinki 1973.)
18) H.J. Bulthuis: *Idoj de Orfeo.* Den Haag 1923.
19) H.A. Luyken: *Pro Iŝtar.* Leipzig 1924.
20) J. Baghy: *Viktimoj.* Budapest 1925. (Repr. Kopenhago 1971.)
21) V. Varankin: *Metropoliteno.* Amsterdam 1933. 2-a eld. Kopenhago 1977.
22) F. Szilágyi: *Tiel okazis aŭ Mistero minora.* Kopenhago 1958.
23) R. Schwartz: *Kiel akvo de l' rivero.* La Laguna 1963. (Repr. Aabyhøj 1977.)
24) J. Ribillard: *Vivo kaj opinioj de Majstro M'saud.* La Laguna 1963.
25) L.L. Zamenhof: *Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto.* Paris 1903. Foto-repr. de la 17-a eld. 1954. Rickmansworth 1969.

26) B. Prus: *La faraono.* 3 vol. Paris 1907-08. (4-a eld.) Varsovio 1957.
27) E. Orzeszko: *Marta.* Paris 1910. 4-a eld. Marmande 1968.
28) H.C. Andersen: *Fabeloj. Plena Kolekto.* I. Paris 1923. 2-a eld. 1926. 3-a eld. Bruxelles 1965. – II. Paris 1926. – III. Paris 1932. – IV. Bruxelles 1963.
29) *La Sankta Biblio.* Londono, Edinburgo, Glasgovo 1926.
30) *Literatura Mondo.* Budapest 1922-1926. 1931-1938. 1947-1949. Repr. Tokio 1975.
31) *Kataluna Antologio.* Komp. J. Grau Casas. Barcelona 1925. 2-a eld. 1931.
32) *Hungara Antologio.* Komp. K. Kalocsay. Budapest 1933.
33) *Ĉeĥoslovaka Antologio.* Red. O. Ginz, S. Kamaryt. Budapest 1935.
34) J. London: *La fera kalkanumo.* Trad. G. Saville. Leipzig 1930.
35) G.K. Chesterton: *La naiveco de Pastro Brown.* Trad. C. Bean. Heronsgate 1937.
36) H. Sienkiewicz: *Quo vadis? Romano el la tempo de Nero.* Trad. Lidia Zamenhof. Amsterdam (1934). Varsovio 1957.
37) S. Asch: *La sorĉistino el Kastilio.* Trad. I. Lejzerowicz. Budapest 1933.
38) J.K. Jerome: *Tri homoj en boato (por ne forgesi pri la hundo).* Trad. G. Badash. Budapest 1934.
39) A. Puŝkin: *La neĝa blovado.* Trad. A. Grabowski. Varsovio 1888. (Repr. Kopenhago 1967. Saarbrücken 1971.)
40) Goethe: *La gefratoj. Komedio en unu akto.* Trad. A. Grabowski. Varsovio 1889. (Repr. Kopenhago 1967. Saarbrücken 1971.)
41) I. Lapenna, U. Lins, T. Carlevaro: *Esperanto en perspektivo. Faktoj kaj analizoj pri la internacia lingvo.* London, Rotterdam 1974.
42) F. García Lorca: *Liriko.* Trad. K. Gusev. Moskvo 1968.
43) Dante Alighieri: *La dia komedio.* Trad. G. Peterlongo. Milano 1963.
44) J.W. Goethe: *Faŭsto I.* Trad. N. Barthelmes. Düsseldorf 1923. 2-a eld. München 1949.
45) K. Kalocsay: *Strečita Kordo.* Budapest 1931. (Repr. Saarbrücken 1978.)
46) A. Mickiewicz: *Sinjoro Tadeo aŭ Lasta armita posedopreno en Litvo.* Trad. A. Grabowski. Warszawa 1918. 2-a eld. 1955.
47) Kp. notoj 39-40. J. Słowacki: *Mazepa. Tragedio en 5 aktoj.* Paris 1912. *El Parnaso de Popoloj. Poemaro.* Varsovio 1913. – *Postrikolto. Suplemento al Parnaso.* Madrid, Warsawa 1921. – B. Prus (t.e. A. Głowacki): *Pekoj de l' infaneco.* Varsovio 1913. Kraków 1963.
48) K. Kalocsay: *Lingvo, stilo, formo. Studoj.* Budapest 1931. Repr. Osaka 1963. 3-a eld. 1970.
49) *Gvidlibro por supera ekzameno.* Red. A. Pechan. Budapest 1966. (Repr. 1979).

50) *Belga Antologio.* Antverpeno 1928. Flandra parto. Komp. H. Vermuyten. Franca parto. Komp. M. Jaumotte.
51) K. Kalocsay, G. Waringhien: *Kiel fariĝi poeto aŭ Parnasa gvidlibro.* Budapest 1932. 2-a eld.: la samaj, R. Bernard: *Parnasa gvidlibro.* Warszawa 1968.
52) I. Madách: *La tragedio de l' homo. Drama poemo.* Budapest 1924. 2-a eld. 1965. – *Eterna Bukedo, Poemoj el dudek du lingvoj.* Budapest 1931. – C. Baudelaire: *La floroj de l' malbono.* La Laguna 1957. – H. Heine: *Kantoj kaj romancoj. Poemkolekto.* La Laguna 1969. – W. Shakespeare: *La tragedio de Reĝo Lear.* Rotterdam 1966. – *Somermeznokta sonĝo.* La Laguna 1967. – *La tempesto.* La Laguna 1970. – Kp. ankaŭ: R. Haupenthal: *La kontribuo de Kálmán Kalocsay al la Esperanta kulturo.* Lelystad 1978.
53) K.H. Borovský: *La bapto de caro Vladimir. Legendo el la rusa historio.* Trad. T. Pumpr. La Laguna 1953. – Praha 1967.
54) *Kalevala.* Trad. J.E. Leppäkoski. Helsinki 1964.
55) W. Shakespeare: *Otelo. La Maŭro de Venecio.* Trad. R. Rossetti. La Laguna 1960.
56) G. Waringhien: *Grand dictionnaire Espéranto-Français.* Paris 1957. (Repr. Paris 1976.)
57) *Esperanto-bulgara vortaro.* Sofio 1963.
58) A. Pechan: *Esperanta hungara vortaro.* Budapest 1958. (2-a eld. 1961, 3-a eld. 1964, 4-a eld. 1968.)
59) E.A. Bokarev: *Esperanta-rusa vortaro.* Moskvo 1974.
60) M.C. Butler: *Esperanto-English dictionary.* London 1967.
61) J. Okatomo: *Nova vortaro Japana-Esperanta.* Tokio 1935.
62) T. Michalski: *Slownik esperancko-polski.* Warszawa 1959.
63) K. Kalocsay, A. Csiszár: *La domfabriko. 6000 frazeologiaj esprimoj hungaraj-esperantaj.* Budapest 1975.
64) F. Munniksma: *Internacia komerca-ekonomika vortaro en naŭ lingvoj.* Antwerp 1975.
65) C. Aymonier: Kelkaj paĝoj de D-ro Zamenhof pri la deveno de Esperanto. En: *Franca Esperantisto* 13.1945: 70, 4-5; 71, 4-5.
66) F. Faulhaber: *Ne tiel, sed tiel ĉi! Konsilaro pri stilo.* Aabyhøj 1965. 3-a eld. 1974.
67) G. Waringhien: *Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj eseoj.* La Laguna 1959.
68) H. Heine: *La rabeno de Bañaraĥ.* Trad. L.L. Zamenhof. Paris 1924. 2-a eld. 1929.
69) J. Bagy: *La teatra korbo. Senpretenda babilado.* Leiden 1934.

70) J. Baghy: *Preter la vivo. Poemaro.* Budapest 1923. 2-a eld. 1931.

71) W. Bormann: *Bona ŝanco. Dekdu prelegoj pri la internacia lingvo kaj la sociaj sciencoj.* La Laguna 1970.

72) G. F. Maura (t.e. G. Waringhien): *Duonvoĉe.* Budapest 1939. – 2-a eld. La Laguna 1963.

73) Kp. noton 7.

74) *la nica literatura revuo.* Nice 1 (1955/56) – 7 (1961/62): 42 numeroj.

75) *Monda Kulturo.* Rotterdam 1 (1962/64) – 2 (1965/66): 15 numeroj.

76) *Norda Prismo.* Boras (Sved.) 1955-1974.

77) Tio validis en 1976. Intertempe, transprenite de Torben Kehlet al Antverpeno, *Stafeto* denove vigliĝis kun rimarkinde abunda eldon-programo. Multe plivigliĝis ankaŭ nia (Artur E. Iltis) propra eldon-ritmo.

INDEKSO DE PERSONOJ

Andersen, H. C. 24
Apitz, B. 18
Asch, S. 26
Atanasov, A. D. 39
Auld, W. 16, 28, 37, 38, 39
Aymonier, C. 43
Badash, G. 26
Baghy, G. 24, 34, 46, 48
Barthelmess, N. 30, 38
Baudelaire, C. 37
Beau, J. 26
Beaufront, L. de 25
Bein, K. 24, 35
Bernard, R. 28
Bokarev, E. 39
Bormann, W. 48, 49
Böti, L. 23
Bourlet, C. 24, 43
Bulthuis, H. J. 23
Butler, M. C. 39, 40
Carlevaro, T. 29, 51
Cart, T. 45
Cervantes, M. de 20, 51
Chesterton, G. K. 26
Csiszár, A. 41
de Kock, E. 21
Eichholz, R. 41
Engholm, S. 20, 30
Faulhaber, F. 47, 49, 56
Forge, J. 23
García Lorca, F. 29, 33
Ginz, O. 25
Goethe, J. W. 28, 30
Grabowski, A. 28, 34, 35, 36
Gusev, K. 29
Heine, H. 19, 37
Hernández, L. 20, 30
Jerome, J. K. 26
Kabe: vd. Bein, K.
Kalocsay, K. 18, 25, 28, 31, 34, 35, 36, 37, 41, 46, 48, 50, 58
Kamaryt, S. 25
Kofman, A. 35
Kurzens, N. 34
Lejzerowicz, I. 26
Leppäkoski, J. 38
Lermontov, M. 34
London, J. 25
Luyken, H. A. 23
Madách, I. 36
Manders, W. 48
Mangada Rosenörn, J. 29, 51
Mattos, G. 30
Maura, G. E.: vd. Waringhien, G.

Michalski, T. 35, 40
Mickiewicz, A. 34
Minniksma, F. 41
Nordensvan, M. 23
Ockey, E. 16
Okatomo, J. 39
Pechan, A. 39
Peterlongo, G. 30, 38
Petöfi, S. 18, 19
Privat, E. 23, 36
Pumpr, T. 25, 38
Puŝkin, A. 28
Ribillard, J. 24
Rossetti, R. 28, 37, 38
Saville, G. 25
Schulze, K. 28
Schwartz, R. 16, 24
Shakespeare, W. 19
Sienkiewicz, H. 26
Simenov, S. 39
Solovjev, M. 34
Szerdahelyi, I. 49
Szilágyi, F. 24, 31
Tárkonyi, L. 25, 28, 30, 37
Varankin, V. 24
Vatré, H. 31
Verloren van Themaat, W. A. 21
Waringhien, G. 12, 28, 31, 36, 37, 40, 43, 46, 47, 48, 50, 52, 54, 56, 58
Zamenhof, L. L. 17, 24, 31, 32, 43, 44, 45, 52
Zamenhof, Lidia 26

INDEKSO DE TITOLOJ

Abismoj 23
Alpa rozo 23
Arbo de la sciado, La 21
Bapto de caro Vladimir, La 38
Belga Antologio 36
Bona ŝanco 38
Ĉeĥoslovaka Antologio 25
Dia Komedio 30, 38
Domfabriko, La 41, 58, 61
Don Quijote 14, 55
Duonvoĉe 50
El Parnaso de Popoloj 34
Esperanto en perspektivo 29, 40, 51
Eterna Bukedo 37
Fabeloj 24
Faraono, La 24, 25
Faŭsto 30, 38
Fera kalkanumo, La 25
Floroj de l' malbono, La 37
Fundamenta Krestomatio 24, 25, 34, 48
Fundamento de Esperanto 36
Gefratoj, La 28, 34
Gösta Berling 20
Grand Dictionnaire Espéranto-Français 39
Gvidlibro por supera ekzameno 34
Homoj sur la Tero 20
Hungara Antologio 25

Idoj de Orfeo 23
Infana Raso, La 16, 59
Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro 41
Johano la Brava 18, 36, 38
Kalevala 38
Kantoj kaj Romancoj 37
Kataluna Antologio 25
Kiel akvo de l' rivero 24, 59
Kun siaspeca spico 16
Leksinko de oficialaj vortoj 16
Leteroj de L.-L. Zamenhof 43
Lingvo Stilo Formo 34, 35, 37
Lingvo kaj Vivo 52
Liriko 29
Literatura Mondo 25, 59
Malnova Testamento 24
Malprudenta scivolulo, La 20
Marta 24
Mazepa 34
Metropoliteno 24
Mistero Minora 24
Monda Kulturo 59
Naiveco de Pastro Brown, La 26
Neĝa Blovado, La 28, 34
Nica Literatura Revuo, La 59
Norda Prismo 20, 59
Nuda inter lupoj 18
Otelo 38
Parnasa gvidlibro 36, 46
Pekoj de l' infaneco 34
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 15, 27, 35, 40, 41, 52
Postrikolto 34

Preter la vivo 48
Pro Iŝtar 23
Proverbaro Esperanta 15, 41, 58
Quo Vadis? 26
Rabeno de Baĥarah, La 48
Reĝo Lear 37, 48
Revuo, La 35, 43
Simpla Konfeso 23
Sinjoro Tadeo 34, 35, 37, 52
Somermeznokta sonĝo 37
Sorĉistino el Kastilio, La 26
Streĉita Kordo 31
Teatra Korbo, La 48
Tempesto, La 37
Tragedio de l' homo 36
Tridektri rakontoj 23
Tri homoj en boato 26
Viktimoj 24
Vivo kaj opinioj de Majstro M'saud 24
Vivo de Zamenhof 23

SEL

garantio por
solida Esperanto-laboro

Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL)

- aranĝas **Kulturajn Semajnfinojn** dufoje jare-
- eldonas kvaronjaran kulturan-literaturan **revuon DIALOGO;**
- eldonas **Esperanto-librojn** (i.a. de Wingen, Kalocsay, Boulton, Auld, de Diego, Rossetti, Varankin, Ribillard, Wüster k.a.);
- gvidas internacian **libroservon** kun larĝ-paleta sortimento;
- plenumas **informan laboron** pri Esperanto en FRG.

Petu senpagajn programojn, prov-numeron aŭ libro-katalogon ĉe:

Sarlanda Esperanto-Ligo **Tel. 0681/811653**
Schulstraße 30 **pĉk Saarbrücken 53 58-663**
D-6601 Scheidt